但是语言是活的，人们在实际使用中总喜欢简便，不喜欢冗长，因此人们总是希望用简单的形式来代替“复杂”的形式，这就形成了构词法中的另一条原则“足够”。所谓“足够”是说：如果简单的形式已经足够表达词义时就可以用简单形式，而不必用“复杂”的形式了。例如为了表达某人的公开演讲，只用 *parolo* 是不够的，但也不必要用 *antaŭpublikparoladaĵo*，用 *parolado* 就足够了。又如：“胆小鬼”、“醉鬼”、“熟人”、“鞋匠”、“勤劳”、“多病”等在世界语里构成 *timulo*, *drinkulo*, *konato*, *ŝuisto*, *laboremo*, *malsanemo* 也就可以了。不必要非用 *timemulo*, *drinkemulo*, *konatulo*, *ŝufaristo*, *laboremeco*, *malsanemeco*。一般说，形容词转化成名词时都要加 *-ec-*，如 *beleco* 美，*juneco* 青春，*boneco* 善良；但也不尽然，主要还是看你想表达的是什么，如要去达抽象的特征，那当然要用 *-eco*，但如你不是强调性质，而是表示抽象的概念，哲理，则用 *-o* 就可以了，如 *dormemo* 贪睡（不必用 *dormemeco*），*lernemo* 好学（不必用 *lernemeco*），*la vero*, *la bono kaj la belo* 真善美（不能用 *vereco*, *boneco*, *beleco*）。又如：*kanto* 歌曲，*vesto* 衣服，*verko* 作品，*manĝo* 食物等词当借助上下文可以清楚表达词义，不会引起误会时，就不一定非用 *kantaĵo*, *vestaĵo*, *verkaĵo*, *manĝaĵo* 了。在不需要区别或不强调性别的场合，*ge-*, *-in-* 也可省略不用，如：*kamaradoj!*（男女）同志们！*lernantoj*（男女）学生们，同学们。*Oni elektis k-dinon Wang Ping prezidanto*（不用 *prezidantino*）*de la kunveno* 大家选举了王萍同志作会议主席。*La sekretario*（不用 *sekretariinno*）*de nia klubo est.as f-ino Mario* 我们俱乐部的干事是玛丽亚小姐。这样用不仅可以，而且较好，例如后两句话中如用 *prezidantino* 和 *sekretariino* 还会产生另外的解释，即会议的主席和俱乐部的干事必须由妇女担任或者好像是还有男主席和男干事一样。

“必须与足够”是辩证统一的构词原则，要很好注意。初学者特别要避免过多地加用后缀，如 *-ad-*, *-eg-*, *-et-*, *-aĉ-* 卜就常被滥用：

*Mi lernadas Esperanton.*  
*Mi deziras korespondadi.*  
*Li laboradas la tutan tagon.*  
*Ĉinio estas landego.*  
*Hungario estas landeto.*

Li laboraĉas malbone.

“学习”和“通信”本身就是持续的动作，而且动词现在时就有表示一贯、经常的意思；“整天工作”也说明了工作的持续性，所以都不用加-ad-。Lando 是指政治上经济上视为一体的一片土地（国土、区域），本身是整体，无所谓“扩大”或“缩小”，因此加-eg-, -et- 不妥，如要表“大国”，“小国”，则应另用形容词 grana, malgranda 来修饰。malbone 已经说明了“坏”，-aĉ- 就是多余的了。

写文章要讲究推敲词句，推敲的方面之一是精练，句子要精练，词也要精练。世界语的词虽然有转化派生与合成的诸种有利构词条件，但绝不能滥用，能用简短词的就不要用长的词，能用原单词表达的就不要用派生或合成词，要养成少用词缀和合成词的习惯，可用可不用的就不用，只有在非用不可的情况下才用。切忌用长的合成词，学员应多选读一些名著，从中学习新词并研究它们的构成方法，从而理解和掌握世界语的构词法。

## EKZERCOJ

A. Laŭble pluformu jenajn vortojn per ŝanĝo de la finaĵo, kaj samtempe ĉinigu iliajn signifojn:

尽可能把下列各词转化为其它词，并译出其词义：

okcidento	oriento	regulo
afabla	utila	varma
dolori	kutimi	voli
antaŭ	ĉirkaŭ	super

B. Laŭble derivu jenajn vortojn kaj ĉinigu iliajn signifojn:

尽可能把下列各词转化为其它词，并译出其词义：

ĉambro	filo	patro	
bela	bona	komuna	
ami	kompreni	lerni	manĝi

C. Kunmetu jenajn vorto-seriojn kaj formu novajn vortojn, samtempe ĉinigu iliajn signifojn:

把下列词组构成合成词，并译出其词义：

1. falo	akvo
2. libro	ŝranko
3. dato	reveno
4. libro	jaro
5. hejmo	lando
6. fiksi	rigardi
7. almozi	peti
8. manĝi	tablo
9. lerni	libro
10. antaŭ	vidi
11. post	morgaŭ
12. fiŝo	kapti
13. nuda	piedo
14. vere	ŝajni
15. voĉo	doni

Ĉ. Esperantigu jenajn vortojn:

安排	讨厌的	在夏天	自由	勇气	殷勤地	有用	广泛地
祝福	现在的						
岳父	女婿	父母	子女	学会	渔夫	监狱	病人
新手	贪玩的	买主	女演员	误解	读物	医生	前言
后记	子夜	外语	祖国	路边的	街上的	黑白的	非凡的
地下的	在桌上	在国内	重新	顺序地	手工地		
来到	离开	依靠	协商	散发	交换	改进	就坐
转交	搬家						

D. Respondu jenajn demandojn:

1. Kio estas kolor-televidilo?
2. Kiom da koloroj la kolor-televidilo povas aperigi?
3. Kia estas la ekrano, kiam ĝi tute ne lumas?
4. Kiuj estas la tri ĉefaj koloroj de lumo?
5. Ĉu estas blanka koloro? Kaj kiel ĝi povas fariĝi?
6. Kiamaniere la televidilo prezentas flavan koloron?
7. Kiu koloro ne povas aperi en televidilo?
8. Ĉu vere nigro ne povas aperi? Ni ja vidas ĝin en televidilo.
9. Kiu koloro estas la plej malfacile aperigebla en televidilo?
10. Kiom granda povas esti televidilo en nuna tempo?

E. Ĉinigu la tekston de la legaĵo.



## LECIONO 15

### Novaj Vortoj

doktrino	学说	miraklo	奇迹
evolui (ntr)	发展, 进化	akomodi (tr)	使适应于
planto	植物	rado	轮子
organismo	机体, 生物体	genio	天才
konforma	适合的	naiva	幼稚的, 天真的
aglo	鹰, 鹭	antikva	古代的
talpo	鼯鼠	faktoro	因素
pistilo	花蕊	perei (ntr)	毁灭
organo	器官	konservi (tr)	保留
mekanismo	机械, 机构	selekti (tr)	选择
supozi (tr)	设想	poluso	极; 北极
harmoio	和谐	felo	毛皮
embrio	胚胎	fono	背景
esenco	本质	adapti (tr)	配上, 使适应
filozofo	哲学家	altaro	祭坛
materio	物质	refuti (tr)	驳倒
tiri (tr)	拉	droni (ntr)	沉没
kombini (tr)	组合	kroĉi (tr)	挂上, 钩住
cirkonstanco	环境	fosi (tr)	发掘
fantazio	想象, 幻想	tezo	学说, 主张
procedi (ntr)	处理, 进行	karno	肉体
vulpo	狐狸	arkta	北极的
merito	功绩	medio	环境
leĝo	法律; 法则	trono	王位, 王权
animalo	动物	membrano	薄膜, 膜片
celo	目的	obstine	固执地
menso	意识, 心灵	ekskomuniki (tr)	开除
piedo	脚	intermita	间歇的
naĝi (ntr)	游泳	biologo	生物学家
stameno	雄蕊		

## LEGAĴO

### LA DOKTRINO DE DARWIN

La merito de Darwin estas tio, ke li malkovris la evolu-leĝon de l' plantaj kaj animalaj organismoj.

La celkonforma<sup>1</sup> aranĝo de l' organismo jam delonge miregigis la homan menson<sup>2</sup>. La okulo de l' ago, la piedo de l' talpo, la naĝilo de l' fiŝo, la pistilo kaj stameno de l' floro<sup>3</sup> — ĉu ne mirakla estas la aranĝo de tiuj organoj, mirige akomoditaj al la celo, por kiu ili servas?<sup>4</sup>

La klarigon de tiu miraklo oni delonge serĉis en dieco<sup>5</sup>. La horloĝo kun ĝia aganta mekanismo, kie ĉiu radeto estas ligita al alia, supozigas ja majstron — horloĝiston<sup>6</sup>. Ĉu ne estas okulfrape, ke la miriga perfekteco de l' organika mondo supozigas kreinton de l' universo, aperigintan la vegetaĵajn kaj animalajn gentojn laŭ anticipe verkita plano?<sup>7</sup>

Darwin elmontris kaj pruvis, ke la perfekteco kaj harmonio de l' organika mondo povas esti klarigitaj naturvole<sup>8</sup>, kaj ke ĉi tie do forestas la neceso supozi la efikon de supernaturaj diecaj fortoj.<sup>9</sup>

La embrion de l' genia penso de Darwin — vere en infanec-naiva formo — ni trovas, laŭesence, ĉe la antikva greka filozofo Empedoklo, vivinta en la 5-a centjaro antaŭ K... Empedoklo distingis en la materio kvar elementojn: fajron, akvon, teron kaj aeron<sup>10</sup>. Pro la influo de du fundamentaj faktoroj: amo kaj malamo, t.e. altirforto kaj forpuŝ-forto<sup>11</sup>, tiuj elementoj kuniĝas aŭ disiĝas, kaj sekve ekaperas diversaj kombinaĵoj. Unue ili estis necelkonformaj, nefirmaj, nevivkapablaj<sup>12</sup>, kaj tial ne povis postresti. Kaj anstataŭe aperis novaj kaj ĉiam novaj formoj, ĝis aperis kombinaĵo vivkapabla. Tiel per natura vojo la celkonforma aperas el malcelkonforma, la perfekta restas rezulte de pereco de l' neperfekta<sup>13</sup>.

Sed ĉe Empedoklo tio estis nur divenaĵo<sup>14</sup>, bazita sur naivaj fantazioj. Kaj pasis pli ol 2,000 jaroj ĝis la scienculo-naturisto de l' 19-a centjaro Charles Darwin sukcesis, sur la bazo de amaso da faktoj, elmontri, ke en la naturo efektive ekzistas natura selektado, dum kies procedo la necelkonformaj formoj pereas, la celkonformaj konserviĝas kaj la specoj perfektigiĝas.

Ni prenu la polusan vulpon<sup>15</sup>. Ĝi, konforme al la vivcirkonstancoj de l' nordo, treege diferencas de aliaj vulpoj. Ĝi posedas dikajn felojn kun hararo blankkolora. La dika felo ŝirmas ĝin kontraŭ la polusaj frostoj; la blanka hararo igas ĝin malpli rimerkebla sur la neĝa fono de la arkt-lando.

El kie aperis tiu okulfrapa adapteco de l' polusa vulpo al la medio, en kiu ĝi vivas?<sup>16</sup> Estas klare, ke tiuj specoj de l' vulpa gento, kiuj ne estis konformaj al la kondiĉoj de l' norda vivo, devis tie malaperi; dum tiuj specoj, kies felo estis nesufiĉe dika, devis pereji pro la frostoj kaj aliaj, kiuj ne posedis “ŝirman” blankkoloron de l' hararo, fariĝis la kaptaĵo de l' malamikoj. Rezulte de tia natura selektado kaj transformiĝo aperis la perfekta speco de polusa vulpo.

La specoj tute ne restas senmovaj, ĉiam same egalaj, ili ja senĉese konformiĝas, aliĝas, perfektigiĝas tra vico da sennombraj generacioj, dum la procedo de batalo pro ekzistado<sup>17</sup>. La mondo organika ne estas vico da ŝtoniĝintaj formoj, per nenio ligitaj unu al alia, sed vivanta ŝtuparo, tra kiu — de l' momento de ekapero de l' vivo sur la tero — malrapide, sed senhalte, marŝas la supreniro de l' mondo organika<sup>18</sup>, de l' subaj, plej simplaj praformoj ĝis la superaj kaj komplikitaj, ĝis la plej supera speco de besto — homo.<sup>19</sup>

En 1859 aperis la Darwin'a “Deveno de l' Specoj”; post 12 jaroj eldoniĝis lia “Deveno de l' Homo”. Liaj verkoj kaŭzis, ke ĉiuj fortoj de mallumo, altaro kaj trono<sup>20</sup> sin ĵetis sur la “kvazaŭdoktrinon” de l' granda naturisto. Iuj refutis lin certigante ke iliaj avoj tute ne estis simioj, sed grandaj sinjoroj; dum aliaj deklaris tiemaniere, ke: “Laŭ Darwin, se ĵeti kokidon en akvon, ĉe ĝi devis aperi naĝmembranoj; sed en efektivo, ĝi simple dronos.”

Kaj ankaŭ ne mankis sciencistoj, kiuj obstine alkroĉiĝis al malnova doktrino pri nemovebleco de l' specoj<sup>21</sup> kaj ekskomunikis Darwin'on for de l' scienco, samkiel ili estis farintaj rilate al Marx.<sup>22</sup>

Sed elfosoj de l' transiraj kaj intermitaj specoj<sup>23</sup> klare montris la pravecon de Darwin. Certe, apartajn tezojn de lia teorio trafis kaj trafas serioza kritiko — precipe, flanke de la modernaj

biologoj; tamen la bazo de l' Darwin'a doktrino eniĝis en la karnon kaj sangon de l' scienco.

(de Prof. S. Semkovski, Sovet-Unio)

## 注 释

1. celkonforma = konforma al la celo 适合生存目的要求的，适应生存目的要求的。整个词组的意思是：生物体对生存环境的适应功能，可简单认为：生物体的适应功能（适应性）。
  2. miri 感到奇怪，miregi 惊奇，miregigi 使……惊奇。
  3. 这是并列的四个词组，是后边主语 la aranĝo de tiuj organoj 的同位语。
  4. akomoditaj 修饰 organoj; pro kiu ili servas 修饰 celo。
  5. 这是一个倒装句主谓宾状句型。Dieco = di-ec-o 神道。
  6. supozigi 设想，猜想；supozigi 使人猜想，暗示。全句的意思是：装配着许多齿轮机件走动不停的钟表暗示出有一个钟表师傅（制作出它）。
  7. aperigintan 是 kreinton 的修饰语，是个主动完成式分词形容词，它保留动词功能，因此有自己的宾语。Aperigi 使出现，引申为“造出了”（多种动植物）。
  8. organika mondo 生物体界；naturvoje 用自然发展的道路（方法）。
  9. 这个从句的意思是：那么这里就没有必要去设想有什么超自然的神力显应了。
  10. 物质的四种元素：火水土空气
  11. 两种基本因素是爱与恨，即吸引了和抗拒力。
  12. necelkonforma 不适应的，nefirma 不稳定的，nevivkapabla 没有生命力的。
  13. 于是在自然的发展中从不适应者中涌现出适应的，不完善的毁灭之后留下了完善的。
  14. divenaĵo 推理之言。
  15. polusa vulpo 北极狐狸。
  16. medio 生活环境，从句 en kiu ĝi vivas 是修饰它的。
  17. la procedo de batalo pro ekzisto 求生斗争的过程。
  18. supreniro 上行，上升。La supreniro de l' mondo organika [生物体世界上升（发展）进程] 是这个从句的主语。
  19. 从低级的最简单的原始形态发展到高等的复杂的形态，直到最高等的动物种类——人。
  20. altaro 祭坛，引申为“神权”。
  21. kroĉi 挂上，钩住；krĉiĝi 抓住；alkroĉiĝi 绕住，附在上面。Nemovebleco 不动性，malnova doktrino de l' specoj 旧的物种不变学说。
  22. 就像他们曾对马克思所干的一样把达尔文从科学界开除出去。
  23. la transiraj kaj intermitaj specoj 过渡期的和间歇期的物种。
  24. certe 的确。apartajn tezojn de lia teorio trafis kaj trafas serioza kritiko — precipe, flanke de la modernaj biologoj 他的理论的个别论断曾遭到并现在还遭到严肃的批评，特别是在现代的生物学者中间。
- \*Empedoklo = Empedokles 恩派多克莱斯（公元前 483 年至 423 年），希腊机械哲学家、诗人、医生和物理学家。

# ĈIUTAGAJ PAROLTURNOJ KAJ ESPRIMOJ

## HOTELO

1. Ĉu estas liberaj ĉambroj?
2. Kian (ĉambron) vi deziras?
3. Mi deziras:
  - unupersonan ĉambron.
  - dupersonan ĉambron.
  - ĉambron kun banejo.
  - ĉambron kun fenestroj al la strato.
  - ĉambron kun fenestroj al la korto.
4. Kiom kostas dupersona ĉambro kun banejo?
5. Ĉe la strato, aŭ ĉe la korto?
6. Ĉiuj unupersonaj (dupersonaj) ĉambroj estas okupitaj.
7. Vi povas ricevi tripersonan ĉambron.
8. Ĉu oni pagas anticipe, aŭ forlasante la hotelon?
9. Momente ni havas nek unu liberan ĉambron.
10. Vi devas atendi ĝis la vespero.
11. Vi ricevos la ĉambron 216.
12. En kioma etaĝo estas ĉi tiu ĉambro?
13. En la dua (en la tria).
14. Ni havas unu liberan ĉambron en la kvara etaĝo.
15. Ĉu vi havas garaĝon?
16. Ne, sed vi povas parki vian aŭton antaŭ la enirejo sur ĉi tiu malgranda placeto.
17. Mi petas vian pasporton kaj mi petas plenigi ĉi tiun formularon.
18. Bonvolu, jen la ŝlosilo por vi sinjoro.
19. Kiom longe vi intencas resti ĉe ni?
20. Ĝis merkredo inkluzive. (Ĝis la kvina de majo.)
21. Ĝis la fino de la kuranta semajno.
22. Mi volus reteni ĉi tiun ĉambron dum kvin tagoj.
23. Bonvolu komisii, ke oni alportu mian pakaĵon supren.
24. Kie estas ĉi tie banĉambro?
25. Kie estas ĉi tie lifto?
26. Kie estas ĉi tie frizejo (restoracio, gazetkiosko)?
27. En la komenco (en la fino) de la koridoro.
28. En la sekva koridoro.
29. Maldekstre (dekstre), sinjoro.
30. En ĉi tiu koridoro la unua (dua) pordo dekstraflanke.
31. Ĝis kioma horo estas malfermita la restoracio?
32. Ĝis la dudek-tria horo.
33. Bonvolu rezervi al mi tablon por kvar personoj.

## 日常用语和句型

### 旅 馆

1. 有空房间吗？
2. 您有什么样的（房间）？
3. 我要单人（双人房间；带浴室的房间；面向大街的房间；面向庭院的房间）。
4. 带浴室的双人房间多少钱？
5. 是靠大街（一边）的或是靠庭院（一边）的？
6. 所有的单人（双人）房间都租出去了。
7. 您可以租三人房间。
8. 房租是预付还是等离开旅馆时付？
9. 现在我们一间空房间也没有。
10. 您只好等到晚上了。
11. 您可以住 216 房间。
12. （这）房间在几楼？
13. 二楼（三层楼）。
14. 四楼还有一间空房。
15. 你们有停车房吗？
16. 没有。但是您可以把汽车停在这个场子入口处的前面。
17. 请交您的护照并填写这张（旅客）单。
18. 请吧，先生！这是您的（房门）钥匙。
19. 您打算住多久？
20. 住到星期三晚上（住到五月五日早上）。
21. 住到本周末的早晨。
22. 这间房我想保留五天。
23. 请托人把我的行李送上来。
24. 这儿浴室在哪里？
25. 电梯在哪里？
26. 理发室（餐厅，报亭）在哪里？
27. 在这条走廊的起点处（尽头处）。
28. 在下一条走廊里。
29. 在左边（右边），先生！
30. 在这条走廊第一个门（第二个门）的右边。
31. 餐厅营业到什么时候？
32. 营业到二十三点。
33. 请为我保留四人的桌面。

## 语 法

### 句 法

研究句子构成的方法叫做句法。每个句子就是一句话。由于说话人表达方式的不同，句

子就分为陈述句，疑问句，祈使句和感叹句四种。句子一定要有主语和谓语，没有主语和谓语不能成句。但在实际使用中，特别在口语中，有无主句或甚至没有主语和谓语的句子，如：

1. Venu al mi! 到我这儿来!
2. Sidiĝu! 请坐!
3. Pluvas. 下雨了。
4. Neĝas. 落雪了。
5. Bone. 好。
6. Tre malvarme. 真冷。

这些句子我们可以把它们看成是省略了主语或谓语的句子。一二两句明显地省略了主语 *vi*，三四两句是自然现象，在古代人们迷信天和上帝的时候，自然现象都是有主宰的，也就有主语，后来演变才简化了。直到今天有的语言仍有“天下雨了”，“天落雪了”的说法，而“雨落下来了”、“雪落下来了”的说法更为普遍。世界语把“雨”“雪”动词化，成为无主句，当然这种句子只限于自然现象。五六两句省略了谓语 *estas*，原句应是 *Estas bone. Estas tre malvarme. Bone* 和 *malvarme* 在这里都是表语，既是表语，前边就应说有主语，它们是主谓表结构，本来是 *Tio estas bona, ke...* 和 *La vetero estas tre malvarma*。由于省去主语（或主语变成从句了），表语就用了副词，进一步又把系动词省去了，成为现在这样简单的句子。

除上述之外，一般的句子都是要有主语和谓语的。在世界语里主语和谓语是句子的主要成分，有主语和谓语的句子称为“单句”。单句中的主语可以是一个名词或代词，也可以是并列的几个名词或代词；谓语可以是一个动词，也可以是并列的几个动词。

主语和谓语是单句的主要句子成分，此外，由于需要，单句里还可以有其他其它次要句子成分，它们是表语、宾语和状语，表语是系动词的附属成分，宾语是及物动词的附属成分，状语是动词的修饰成分，它们都是谓语的充实部分，是协助谓语来说明主语的。

再其次，无论是主要句子成分或是次要句子成分，都是由一些单词构成的，这些单词有时也需要自己的单独的修饰或补充，以便更细腻地表达意思，这种单独的修饰或补充属于词与词的修饰关系，也就是词与词的连接关系，学员们在初级课本里已学过了，在句子里它们属于更次要的地位，本书把它们分别叫做修饰语（直接修饰词，如形容词修饰名词，副词修饰形容词等）和补语（介词短语）两类。

注：这种修饰个别词的单词或短语，一般分类叫做“定语”（包括修饰名词的形容词和介词短语）和“状语”（包括修饰动词、形容词或副词的副词和介词短语）。

从句子结构来讲这种个别词的修饰关系并不起明显作用，为了简单明了，可以把它们与被修饰的词看成一个句子成分，如：

**La blanka domo estas vere tre granda!**

那座白房子确实是非常大呀!

这是主谓表型的句子，可以简单地分析为 *La blanka domo* 是主语，*estas* 谓语（系动词），*vere tre granda* 是表语。这多清楚！请与下列分析比较：

La	blanku	domo	estas	vere	tre	granda.
修饰语	修饰语	主语	谓语	修饰语	修饰语	表语
(定语)	(定语)	(主语)	(谓语)	(状语)	(状语)	(表语)

从逻辑上讲，当有修饰关系的两个词并列在一起时，它们就彼此发生了关系，结合成一个整体，有了新的词义了，如：

*Domo* 房子（可以泛指任何一座房子）

*Blanka domo* 白房子（范围缩小了，与“房子”原义不同了，是“白房子”，不是任何房子了）

*La blanka domo* 那座白房子（范围更小了，确指眼前“那座白房子”，而不是其他别的

白房子了)

这样 *la blanka domo* 这一组词已构成一个完整的新概念，是不可分的，在句子中处于主语地位，把它们一起看作主语成分不是很有道理吗！

因此作为句子成分，分为主语、谓语、表语、宾语、状语也就够了，修饰语和补语一般可不分，附于它所修饰的成分上即可，只有在需要时再分。

分析句子成分过去用图解式，但那需要另划图解，比较麻烦。省事的办法是在词下划不同的线来表示，如：

主语用双线 主语用双线

谓语用单线 谓语用单线

表语用点线 表语用点线

宾语用曲线 宾语用曲线

状语用虚线 状语用虚线

单句是句法的基础，只有把单句结构搞清楚了，才有条件进一步研究其它种类的句子。

两个单句并列，中间用连词连接的句子叫做并列句。并列句可以是两个单句组成，也可能是三个单句组成，它们都是独立的单句，只是由于有了连词，才连成一句的，如：

Mi staras kaj vi sidas.

我站着而你们坐着。

Mi estas ĉino, li estas anglo kaj ŝi estas poloj.

我是中国人，他是英国人，她是波兰人。

以上是并列句，它们都是单句简单的并列，由连词串连起来。只要掌握好单句，造并列句是容易的。

比较难的是主从句。主从句又叫主从复合句，是由主句加从句组成的句子，从句都要求有连词或关系词与主句相连。在这种句子里都有主句和其从属的子句。主句是主干，从句是从主句引申出去的支干，换句话说：从句是主句里的某个句子成分分离或引申而成的句子，其功能相当于主句里的原句子成分，也可以说：从句是主句中某一句子成分的代表，句子成分不同，代表它的从句也就不同，这就形成为下列各种从句：

主语从句：代替主句中的主语

表语从句：代替主句中的表语

宾语从句：代替主句中的宾语

状语从句：代替主句中的状语

修饰语从句（定语从句）：代替主句中的修饰语（定语）

下面几课将分别研究这五种不同的从句。

主从句里主句只能有一个，而从句则不定，可以是一个也可以是两个三个。从句可以是并列的（指两个从句由连词连接），也可以是主从的（指从句本身又有另一个从句），有时候，从句带从句，后者又有自己的从句，这第二种从句还产生各自的新从句，这样一个套下去成为一句很长很长的主从句，如本书第五课课文的第二句就是这样一个带有一连串从句的主从句，从 *Ni povas jesi tion* 开始，一直到后边第四段的末尾 *kontroli la disvolviĝon de la lingvo* 才算一句话结束。这个句子的主句是 *Ni povas jesi tion*，后边并列的一、二、三、四段都是它的原因状语从句。第一个原因状语从句是由并列句组成的；第二个原因状语从句又有自己的原因状语从句，这后一个从句的谓语是由两个动词 *havas* 和 *donas* 并列组成，第一个动词 *havas* 有四个并列的宾语（*a, b, c, ĉ*），其中第四个宾语 *vortotrezoron* 还带有状语从句 *en kiu estas la vortradikoj*，而这个从句里的主语名词 *vortradikoj* 又有自己的修饰语（定语）

从句。第四个原因状语从句的宾语 *akademion* 又带有自己的修饰语（定语）从句。

## EKZERCOJ

A. Respondu jenajn demandojn:

1. Kio estas la merito de Darwin?
2. Kiu kreis la plantojn, animalojn kaj homojn?
3. Kio estis Empedoklo kaj kion li diris pri materio?
4. Kion Darwin elmontris pri deveno de l' specoj?
5. Ĉu polusa vulpo estis devene tia, kia nun ĝi aspektas?
6. Ĉu aliaj vulpoj, kiuj ne posedas dikan felon kun blankkolora hararo, povas nun vivi en arktlando?
7. Ĉu la specoj estas ĉiam same egalaj kaj senmovaj?
8. Kio estis la titolo de Darwin'a verko en 1859?
9. Kiel la mallumaj fortoj atakis lin?
10. Ĉu vi bone scias pri Darwin kaj lia doktrino?

B. Mallongigu la tekston de la legaĵo.

C. Jen kelkaj korelativaj paroj: KIE-TIE KIEL-TIEL KIA-TIA KIAM-TIAM KIOM-TIOM.

Enmetu ilin en jenajn frazojn:

1. \_\_\_\_\_ estos venintaj la delegitoj, nur \_\_\_\_\_ ni povas diskuti la aferon.
2. \_\_\_\_\_ troviĝas bela pejzaĝo, \_\_\_\_\_ mi volas starigi mian domon.
3. \_\_\_\_\_ li venis, \_\_\_\_\_ li ankaŭ iros.
4. \_\_\_\_\_ li volas havi, \_\_\_\_\_ li ricevu.
5. \_\_\_\_\_ estas via laboro, \_\_\_\_\_ estas via valoro.
6. \_\_\_\_\_, \_\_\_\_\_ vi postulas, ni ne povas doni.
7. Mi malofte renkontis \_\_\_\_\_ homon, \_\_\_\_\_ li.
8. Mi renkontis ŝin \_\_\_\_\_, \_\_\_\_\_ la ponto transiras la riveron.
9. \_\_\_\_\_, \_\_\_\_\_ la horloĝo sonigis la kvaran horon, mi aŭdis lian paŝon sur la ŝtuparo.
10. La kunvno ne estis \_\_\_\_\_ longedaŭra, \_\_\_\_\_ li supozas.

Ĉ. Korektu eraron en jenaj frazoj:

1. La gepatroj de Jozefo tre ĉagrenis pro lia maldiligenteco.
2. Homo plene vivas nur tiam, kiam li havas kreaĵojn en lia ĉiutaga laboro.
3. En tiu tempo oni ne vidis tiom da novajn konstruaĵojn, kiel nun.
4. Boteloj plenaj da akvo estas tre pezaj.
5. La ministro enoficigis lin kiel estro de l' ĉefurbo.
6. Kiam vi bruligas fajron, tre gravas, kiom lignon vi surmetas.
7. La tagmanĝo prenita ni veturis hejmen.
8. Mi ne scias, se tiu poŝtmarko servis por afrankado.
9. La kongreso okazos de la 20-a ĝis la 27-an de majo.
10. Tiun beston oni nomas talpon.

D. 试把本课读物正文第五段中的句子分开，每句但写一行，然后试着分析每句的句子成分（在句下划线，分为主谓宾表状等不同成分）；最好说明各是什么句子（单句、并列句、主



从句) 结构; 主从句还要求把从句用箭头符号划到主句中它应处的地位或代指词上。

E. 用上述同样的方法分析下列各句的句子成分和主句与从句的关系:

1. Kiu koloro ne povas aperi en televidilo?
2. Rigardu televidilon, kiam ĝi tute ne lumas.
3. Nun ŝaltu la televidilon, kaj vi vidos kolorajn bildojn moviĝantajn.
4. Malŝaltu, kaj ĝi ne ŝanĝiĝas, daŭre brilas, kaj vi perceptas grizon.
5. Oni lastatempe produktis televidilon, kiu estas larĝa pli ol 20 metrojn kaj alta 10 metrojn.
6. Se ni ne povas ridigi nin en Esperanto, Esperanto ne estus vere lingvo taŭga por la homa vivo.
7. Li estis amata edzo kaj patro kaj havis multajn geamikojn.
8. Al ŝi li donas sian monon por fondi kune novan domon.
9. Dum tri jaroj Schwartz redaktis faman Esperantan amuzan gazeton.
10. En la frua tempo de Esperanto, verkistoj malofte penis amuzi siajn legantojn, kvankam baldaŭ aperis kelkaj ridigaj verkistoj.

## LECIONO 16

	<b>Novaj</b>	<b>Vortoj</b>	
konversacio	会话	insigno	徽章
delegito	代表	avenuo	林荫大道
restoracio	餐厅	kelnero	服务员
ŝati (tr)	喜欢	menuo	菜单
viando	肉	supo	汤
bifstekoj	牛排	biero	啤酒
terpomo	土豆	salato	色拉, 凉拌菜
ŝinko	火腿	pizo	豌豆
kotleto	炸肉片	legomo	蔬菜
tosti (ntr)	干杯		

## LEGAĴO

### ESPERANTISTA KONVERSACIO

(Sinjoro Adams estas usonano. Li iras sur strato de Parizo kaj renkontas sinjoron, kiu portas insignon de verda stelo sur la jakoj.)

Adams: Saluton, sinjoro! Ĉu vi parolas Esperante? Mi vidas, ke sur via jakoj estas la verda stelo.

Sinjoro: Saluton, sinjoro! Jes, mi estas esperantisto. Vi bone parolas Esperante.

Adams: Mi parolas iomete<sup>1</sup>. Mi estas de Usono.<sup>2</sup>

Sinjoro: Esperantisto de Usono? Bone, bone! Mi estas s-ro Petit, UEA-delegito en Parizo. Mi bonvenigas vian viziton al nia urbo.

Adams: Pardonu, sinjoro, ne tro rapide, mi petas<sup>3</sup>. Mi ne komprenas.

Petit: Ho, jes... Mi parolas tro rapide, ĉu ne? Mi estas s-ro Petit, UEA-delegito en Parizo. Mi bonvenigas vian viziton al nia urbo. En kiu hotelo vi loĝas?

Adams: Mi ankoraŭ ne decidis. Ĉu vi povas informi min, kiu hotelo estas bona?<sup>4</sup>

Petit: La hotelo "Granda" estas bona. Ĝi estas tre moderna, kaj kun bonaj, molaj kaj komfortaj litoj.

Adams: Kie ĝi estas?

Petit: Ĝi estas en la "avenuo de la Verda Stelo", proksime al la fervojo-stacio.

Adams: Ho, bone... Mi iras al la stacio nun. Mi dankas... adiaŭ, sinjoro.

Petit: Ne grave... Ho, sinjoro! Ĉu vi estas malsata nun?

Adams: Nu, jes, mi estas malsata... kaj tre soifa ankaŭ... Ĉu estas restoracio proksime?

Petit: Jes, estas du restoracioj proksime. Jen antaŭe estas la restoracio "Ritz". Ĝi estas granda kaj luksa. Kaj kontraŭe<sup>5</sup> estas la restoracio "Esperanto". Ĝi estas malgranda, sed bona, pura kaj moderna.

Adams: Restoracio "Esperanto"?

Petit: Jes, ĝi estas esperantista entrepreno. Tie la kelneroj scipovas paroli Esperante kaj esperantistoj ŝatas viziti ĝin.

Adams: Mi tre ĝojas... do estu la restoracio "Esperanto"!<sup>6</sup> Sinjoro, ĉu vi povas kune manĝi kun mi?

Petit: Ankaŭ mi tion intencas. Mi ja volas inviti vin! Mi esperas, ke tie ni eble renkontiĝos kun kelkaj esperantistoj...

Adams: Bonege! Ni do iru!

(Ili eniras la restoracion "Esperanto".)

Petit: Ha! Estas samideanoj Martel kaj Hanson! Saluton, sinjoroj!

Martel kaj Hanson: Saluton!

Petit: Jen mi konigas al vi usonan samideanon s-ro Adams! S-ro Adams, tiu ĉi estas s-ro Martel, hispano, kaj tiu ĉi estas s-ro Hanson, svedo!

Adams: Bonan tagon, sinjoroj!

Martel kaj Hanson: Bonan tagon, s-ro Adams! Sidiĝu ĉe la tablo!

Adams: Dankon! Mi tre ĝojas renkontiĝi kun vi!

Martel kaj Hanson: Ni ankaŭ.<sup>7</sup>

Petit: Ho, sinjoroj! S-ro Adams estas usonano, s-ro Martel estas hispano, s-ro Hanson estas svedo kaj mi franco. Estas vere internacia renkontiĝo!

Martel kaj Hanson: Jes, vere!

Adams: Jes, vere... Pardonu, sinjoroj, mi estas tre soifa. Kelnero, donu grandan glason da akvo!

Petit: Ho sinjoro, akvo ne estas bona! Vino estas pli bona!... Kelnero, mi petas, ke ni havu vinon!

Adams: Jen estas s-ro Martel, kiu estas hispano... Kion vi preferas trinki, s-ro Martel?

Martel: Mi preferas vinon. Kaj mi ankaŭ deziras manĝi.

Kelnero: Ĉu vi deziras tuan manĝon, sinjoro?<sup>8</sup>

Martel: Jes, kompreneble. Ni hispanoj ŝatas manĝi multon.

Hanson: Pardonu, sinjoro Martel, ne pli ol ni, la svedoj!<sup>9</sup> Mi ankaŭ deziras manĝi kun vi. Kion vi havas por manĝi<sup>10</sup> hodiaŭ, kelnero? Kie estas la menuo?

Kelnero: Jen ĝi estas!

Martel: Mi deziras unue supon, ... kaj poste viandon.

Adams: Ankaŭ mi deziras tutan manĝon. Sed, pardonu, unu akvon, ĉar mi soifas! Poste, nu, supon kaj bifstekon!

Petit: Mi bedaŭras, sed mi deziras vinon, kaj mi povas trinki eĉ kvin glasojn! Mi ankaŭ manĝos... Fiŝo estas bona?

Kelnero: Jes, certe, sinjoro!<sup>11</sup>

Petit: Do, fiŝon!

Hanson: Mi deziras bieron, terpomojn, kaj salaton kun fiŝo.<sup>12</sup>

Adams: Jes, bone. Kelnero, bonvolu iom rapide! Kaj ne forgesu doni al mi ankaŭ bonan, freŝan panon...

Kelnero: Jes, tuj! Ĉu sinjoroj ankoraŭ deziras aliajn?

Martel: Mi deziras ankaŭ ŝinkon kun pizoj.

Hanson: Do, aldonu por mi ankaŭ kotleton po unu glason por tosti nian renkontiĝon!

Ĉiuj: Bona ideo! Ni do trinku por la internacia amikeco!

(de George Alan Connor, Usono)

## 注 释

1. iom-et-e 一丁点
2. 我从美国来, de Usono 是表语。

3. ne tro rapide 省去了谓语 parolu。整个句子是口语省略句型: Pardonu min, sinjoro! Mi petas, ke vi parolu ne tro rapide 对不起, 先生! 请别说得太快了。
4. min 是间接宾语 al mi 的变形, 后边 kiu 引起的疑问句是宾语从句。
5. kontraŭe 在对面。
6. do estu la restoracio “Esperanto”! 那么就(在)“世界语餐厅”吧!
7. 我们也很高兴会见您。
8. tutan manĝon 整餐饭(不是随意小吃, 而是吃一顿饭, 包括饮料、正餐和尾食)。
9. vi manĝas ne pli multe ol ni (您并不比我们瑞典人吃得多)!
10. 你们今天有些什么(菜)可(供应顾客)吃的?
11. 当然好, 先生!
12. 鱼块色拉。
13. 先生们, (要)酒, (要)酒呀!

## ĈIUTAGAJ PAROLTURNĴOJ KAJ ESPRIMOJ EN ESPERANTO-KLUBEJO

1. Saluton, samideano!
2. Saluton, samideanino!
3. Kiel vi nomiĝas?
4. Mia nomo estas...
5. De kie vi venis?
6. Mi venis el Finnlando.
7. El kiu urbo?
8. El Helsinko.
9. Eble ni sidiĝu?
10. Bone. (Volonte.)
11. Kiam vi venis Ĉinion?
12. Ĉu vi longe restos en nia lando?
13. Ankoraŭ unu semajnon.
14. Ĝis la venonta sabato.
15. Kiujn urbojn en Ĉinio vi jam vizitis?
16. Mi estis en...
17. Kiajn impresojn vi havas pri...?
18. Kiel impresis vin...?
19. Kiel disvolviĝas la Esperanto-movado en Helsinko?
20. Ĉu vi havas multajn societojn?
21. Se mi ne eraras, la plej vigla movado ĉe vi estas en...
22. Ĉu vi gvidas kursojn en via urbo?
23. En kiom da lernejoj estas instruata ĉe vi la internacia lingvo?
24. Ĉu ankaŭ en universitatoj ekzistas kursoj de Esperanto?
25. Kiu nova Esperanto-libro aperis lastatempe ĉe vi?
26. Ĉu vi apartenas al iu Esperanto-organizaĵo?
27. Mi apartenas al UEA kaj ĈEL.

28. Kiajn aranĝojn organizas via Esperanto-klubo?
  - via urba asocio?
  - via landa organizaĵo?
29. Ni organizas kursojn.
  - lingvajn seminariojn.
  - ekspoziciojn
30. Ĉu ĉe via asocio agas iuj sekcioj?
31. Jes. Ili estas kelkaj, ekzemple la sekcio junulara, instruista, turista.
32. Kiel agadas via turista sekcio?
33. Ĝi organizas landajn kaj eksterlandajn ekskursojn, prelegojn, tradukas turismajn gvidlibrojn kaj faldofoliojn.
34. Ĉu multaj ĉi-specaj publikaĵoj aperas en via lando?
35. Kelkaj jare.
36. Kiom da esperantistoj troviĝas en via lando?
37. Kian aranĝon vi organizis okaze de ...?
38. Ni organizis kelkajn prelegojn pri...
39. Ni preparis ekspozicion de Esperanto-eldonaĵoj el la sfero de...
40. Ni sendis al niaj eksterlandaj geamikoj specialajn salutkartojn kaj donacetojn.
41. Okaze de la Internacia Tago de Esperanto-Libro mi donacis al kelkaj miaj geamikoj lernolibrojn, vortarojn kaj infor-broŝurojn pri Esperanto.
42. Kiujn Esperanto-revuojn vi abonas?
43. Mi abonas "Heroldo de Esperanto" kaj "El Popola Ĉinio">
44. Mi regule aŭskultas radioelsendojn de Radio Pekino.
45. Ĉu la plej proksiman libertempon vi pasigos inter esperantistoj?
46. Jes. Mi partoprenos en la Universala Kongreso de Esperanto.

## 日常用语和句型

### 世界语俱乐部

1. 同志，你好！
2. 你好，同志！
3. 你叫什么名字？
4. 我的名字是……
5. 您从哪来？
6. 我从芬兰来。
7. 哪个城市？
8. 赫尔辛基。
9. 我们可以坐下（谈）吗？
10. 好的。
11. 你什么时候到中国来？
12. 你在我国停留时间长吗？
13. 还有一个礼拜。
14. 呆到星期六。

15. 你到过哪些中国城市？
16. 我到过……
17. 对于……你有什么印象？
18. ……对你的印象怎么样？
19. 赫尔辛基的世界语运动开展得怎么样？
20. 你们有许多团体吗？
21. 如果我没弄错的话，你们……的运动最活跃。
22. 你在贵市也教世界语班吗？
23. 你们那里有多少学校教授世界语？
24. 大学里也有世界语班吗？
25. 你处最近出版有什么新的世界语书籍吗？
26. 你参加过世界语组织吗？
27. 我参加了 UEA 和 ĈEL。
28. 你们的世界语俱乐部（贵市世协、贵国世协）都组织些什么活动？
29. 我们组织学习班（语音学讨论会、展览会）。
30. 贵会有专业组织吗？
31. 有。有几个，例如青年会，教师会，旅游会。
32. 你们的旅游会怎么活动？
33. 组织国内外旅游、报告会、翻译导游小册子和折页推广品。
34. 贵国这方面出版物出得多吗？
35. 一年出几种。
36. 贵国有多少世界语者？
37. 在……的时候你们组织过什么活动？
38. 我们组织过几次关于……的报告会。
39. 我们收集了……的世界语出版物展览会。
40. 我们给外国朋友们寄了专门的贺片和礼品。
41. 在国际世界语书节我向几个朋友赠送了世界语课本、字典和介绍小册子。
42. 你订阅什么世界语杂志？
43. 我订阅“世界语先驱报”和“中国报道”。
44. 我按时收听北京电台的广播。
45. 最近的一个假期你打算在世界语者中间度过吗？
46. 是的。我将参加国际世界语大会。

## 语法

### 主语从句 宾语从句

主语从句是主句中的主语引申而成的句子，通常用连词 **ke** 和主句相连接，一般情况下主句是无主句（因主语变成了从句），但有时候主句是用指示代词 **tio** 作主语，那时主句则是说明 **tio** 的，**tio** 是代替从句的，**tio** 与从句是同一事物，如：

Ĉu estas vere, ke li rompis al si la kruron?

他腿断了，是真的吗？

Ĉu tio estas vera, ke li rompis al si la kruron?

他腿断了，那是真的吗？

Ne plaĉas al li, ke oni lin flatas.

他不喜欢人们的阿谀奉承。

Al li ne pleĉas tio, ke oni lin flatas.

他不喜欢人们的阿谀奉承。

Tio estas ĝojinda, ke li sukcesis en la ekzameno.

值得高兴的是他考上了。

Tio estas ĝojinda, ke li sukcesis en la ekzameno.

他考上了，那是值得高兴的。

当从句是假设口气时，从句也可以用连词 *se* 连接，如：

Estus bone, ke (se) li venus.

他要是来就好了。（希望他来，但事实上可能不来）

Estos bone, ke (se) li venos.

他要来就好了。（他可能来）

从上面例句可以看出，主句有 *tio* 和没有 *tio* 都可以。但应注意，有 *tio* 时表语要用形容词，没有 *tio* 时主句是无主语的句子，表语应用副词。

除 *ke*, *se* 外，疑问词也可以连接主语从句，如：

Ne estas certe, pro kio li forlasis la hejmon.

他离家的原因尚不清楚。

Ne estas scieble, kio estis antaŭe.

他以前是干什么的还无法知晓。

连词 *ke*, *se* 连接的是主从陈述句，疑问词连接的是主从疑问句，此外，还有一种主从关系句。

主从关系句。是用相关词中的两组代词 *tio kio* 和 *tiu kiu* 来连接，在这种句子里 *kio* 和 *kiu* 不再是疑问词，而是关系连词了，它本身没有词义，是主句的 *tio* 或 *tiu* 的替身，只起连接作用，有时在成语、谚语中主句的 *tio tiu* 可以省略。下面是几个主从关系句的例子：

Tiu, kiu sidas apud via frato, estas mia amiko.

坐在你兄弟旁边的那人是我的朋友。

Tio, kio estas neebla por unu persono, estas ludilo por grupo da personoj.

一个人干不了的事，几个人一起干就不算一回事。

Bone ridas (tiu), kiu laste ridas.

谁笑到最后，谁笑得最好。

Kio pasis, (tio) ne revenos.

过去的事不会再回来。

代词 *kiu* 指人，*kio* 指事物，它们可以有主格（即原词）和宾格（加 *-n*），表示所有关系时不能转化词尾为 *-a* 的办法，因为另有 *kia*（那样的），而要用相关词中专表所有的 *kies*，因此 *kies* 也可以连接主语从句，如：

Tiu, kies portreton vi montris, estas mia fratino.

你给我看的相片上的那个人是我的妹妹。

宾语从句：

宾语从句是主句中的宾语成分引申而成的句子。与主语从句相似，宾语从句也是用连词 *ke* 和主句相连接，如：

Mi scias, ke li estas malsana.

我知道他病了。

Mi bezonas, ke oni min helpu.

我需要别人帮助。

**Mi informas al vi, ke ni kunvenos ĉivespere.**

我通知你咱们今晚开会。

**Li avertis, ke oni ne iru tien.**

他警告说，别到那里去。

同样，也可以用疑问词来连接宾语从句，如：

**Mi ne scias, kiu li estas.**

我不知道他是谁。

**Li ne diris, kian rimedon li uzis.**

他没说他用的是什么方法。

**Neniu scias, kio okazis.**

没人知道发生了什么事。

**Diru al mi, kion vi deziras.**

告诉我你要什么。

**Li ne volas diri, kiom kostis la donaco.**

他不愿说礼物值多少钱。

**Li ne skribis, kiel li fartas.**

他没有写他现在身体如何。

**Li demandis ŝin, kial ŝi revenas tiel malfrue.**

他问她为什么回来得这么晚。

**Mi ne rekonas, kies ĉapelo ĝi estas.**

我认不出这是谁的帽子。

**Neniu scias, de kie li venis.**

没人知道他是从哪里来的。

**Mi ne scias, ĝis kiam li restos ĉi tie.**

我不知道他将在这里呆到什么时候。

**Oni esploras, ĉu la rivero estas sufiĉe profunda por ŝipoj.**

人们在调查这条河的深度能否通航。

以上的宾语从句包括用连词 **ke** 连接的陈述句型和用疑问词连接的疑问句型，此外，还有一种关系句型。连接宾语从句的关系词是相关词表中的 **kio, kiu, kia, kies, kial, kiel, kiam, kie** 和 **kiom**，这些词在关系句里也丧失疑问的词义，只是主句中宾格指示代词的替身，本身没有词义，如：

**Faru tion, kio al vi plaĉas.**

做你喜欢做的事！

**Alportu tion, kion mi petis.**

把我要的东西拿来。

**Mi ne konas tiun, kiu alportis la leteron.**

我不认识送信来的那个人。

**Mi ne scias tiujn, kies nomojn vi menciis.**

我不知道他提到名字的那些人。

当主句的指示代词 **tion** 和从句的关系词 **kion** 同格互指时，主句的 **tion** 可以省去，如：

**Faru, kion mi ordonis.**

按我命令办。

在陈述句和疑问句里，主语从句与宾语从句的区别比较明显，前者的主句是<sub>0</sub>无主句，



后者的主句是有主句，此外，对比之下还可发现：前者可以用连词 **ke**, **se** 连接，后者只能用 **ke** 连接，在疑问句里，前者只能用疑问代词和 **ĉu**，而后者则几乎所有疑问词都能用。但在关系句里它们的区别就不那么明显，区别它们的关键是看主句里的指示代词是主格还是宾格，是主格时它后面的从句就是主语从句，是宾格时它后边的是宾语从句，因为关系句里起连接作用的关系词是主句里指示代词的替身，它们是互指的同一事物，是二而一的词。根据这一道理，可以归纳出下列公式：

主语从句：

tio, kio (kion)...

tiu, kiu (kiun)...

tiuj, kiuj (kiujn)...

宾语从句：

tion, kio (kion)...

tiun, kiu (kiun)...

tiujn, kiuj (kiujn)...

此外，宾语从句还有一种特殊的排列形式，即把主句插入从句中间，并省去连词 **ke**，如：

La feliĉo, mi scias, ne daŭras longe. (Mi scias, ke la feliĉo ne daŭras longe.)

我知道好景不长。

Via klopodo, kredu, ne estos vana. (Kredu, ke via klopodo ne estos vana.)

请相信，你的努力将不会是徒劳的。

## EKZERCOJ

- A. Ĉinigu jenajn vortojn kaj uzu ilin korekte por verki frazojn:
- |           |            |          |
|-----------|------------|----------|
| peri      | perlabori  | perforti |
| perletere | perkrajone | senpera  |
- B. Jen kelkaj prepozicioj: PO POR POST PRETER PRI PRO SEN SUB TRA TRANS. Enmetu ilin korekte en jenajn frazojn:
- ..... la manĝo, kiu kostis..... dudek dolaroj ni ĉiuj foriris.
  - Ni iris ..... la riveron, kaj ..... la aliborda arbitaro ni alvenis vilaĝon.
  - ..... plua diskutado ni ekiris ..... la longa silenta strato.
  - Mi dankis..... la mono, kiun li donis al mi ..... la asocio.
  - ..... sia trankvila ekstero, li tute ne estis kontenta ..... la irado de la afero.
  - Li revenis ..... du tagoj, kaj el la ricevitaj cent frankoj li donis al siaj infanoj ..... dudek.
  - Li ne volis diskuti..... tio, do iris ..... mi ..... saluto.
  - ..... multaj kaŭzoj li ne povis atingi tiujn, kiuj jam kuris antaŭen..... halto.
  - ..... la tuta nokto li laboris ..... sia familio.
  - La demando estis ankoraŭ..... juĝado, do mi nenion rajtis diri .....ĝi.
- C. Respondu jenajn demandojn:
- Kiu landano estis s-ro Adams kaj kiun landon li vizitis?
  - Kial li supozis, ke la sinjoro, kiun li renkontis sur la strato, estis esperantisto?
  - Kiel nomiĝis la s-ro kaj kio li estis?
  - Kiion diris s-ro Petit pri la botelo "Granda"?

5. Kie kaj kun kiuj s-ro Adams manĝis?
6. Kion s-ro Adams unue petis en la restoracio? Kaj kial?
7. Kalkulu: kion mendis Adams, kion Petit kion Martel, kion Hanson, kaj entute?
8. Ĉu vere Hanson manĝis pli multe ol Martel?
9. S-ro Petit kuraĝigis la samideanojn trinki francan vinon. Ĉu li sukcesis?
10. Kio estas salato? Ĉu vi ĝin ŝatas manĝi?

Ĉ. Prozigu la tekston de la legaĵo. 把课文改写成散文。

D. Verku laŭeble longan dialogon kun temo ke vi vizitas Esperantan asocion kaj konversacias kun tieaj esperantistoj.

E. Distingu, ĉu subjektaj aŭ objektaj estas subpropozicioj en jenaj frazoj:

指出下列句子中的从句主语从句或是宾语从句

1. Ŝajnas, ke la pluvo ĉesos.
2. Ne estas permesate, ke infanoj legu tian libron.
3. Mi scias, ke li estas via instruisto.
4. Li skribis al sia frato, ke li pagu siajn ŝuldojn.
5. Faru tion, kion vi promesis.
6. Vi ne diris, kion li deziras.
7. Tio estas klara, ke li ne venos.
8. Darwin elmontris kaj pravis, ke la perfekteco kaj harmonio de l' organika mondo povas esti klarigitaj naturvoje.
9. Liaj verkoj kaŭzis, ke ĉiuj fortoj de mallumo, altaro kaj trono sin ĵetis sur la "kvazaŭdoktrinon" de l' granda naturisto.
10. Ĉu ne estas okulfrape, ke la miriga perfekteco de l' organika mondo supozigas kreinton de l' universo, aperigintan la vegetaĵajn kaj animalajn gentojn laŭ anticipe verkita plano.

## LECIONO 17

### Novaj Vortoj

incidento	小事件	fulmo	闪电
evento	(大) 事件	signo	记号; 符号
influ (tr.)	影响	intensa	强烈的
blovi (ntr.)	吹	vento	风
klopodi (ntr.)	努力	lui (tr)	租赁
rikiŝo	人力车	timono	车杠
eviti (tr.)	避免	ŝiri (tr)	撕, 拉断
vatveŝto	棉背心	butono	纽扣
probable	可能	ventro	肚子
akcidento	意外事故	ĉagreni (tr)	使烦恼
prokrasti (tr)	耽搁	paŝi (ntr)	迈步
polico	警察	apogi (tr)	依靠, 支持
peltorobo	毛皮袍子	giganto	巨人
kupro	铜	stagni (ntr)	停滞
spiti (tr)	不顾, 甘冒	premio	奖品
ŝvebi (ntr)	翱翔; 浮现	parkere	默记地

## LEGAĴO

### MALGRANDA INCIDENTO

Ses jaroj jam pasis fulmrapide, de kiam mi venis el la provinco al la ĉefurbo<sup>1</sup>. Dum tiu ĉi tempo mi ja persone vidis kaj aŭdis sufiĉe da tiel nomataj gravaj ŝtateventoj<sup>2</sup>, sed ili lasis en mia menso nenian postsignon krom ununura influo: intensigi mian malbonan humoron, — verdire, igi min laŭ la tempopaso pli kaj pli malestimi la homojn.

Sed unu malgranda incidento ja havis signifon por mi, kaj fortiris min de la malbona humoro, ke eĉ nun mi ne povas ĝin forgesi.

Estis vintra tago en la sesa jaro de la Respubliko<sup>3</sup>. La norda vento blovis furioze. Por perlabori la ĉiutagan panon, mi devis eliri frumatene. Survoje mi renkontis preskaŭ neniun, kaj nur post multa klopodo sukcesis lui rikiŝon por iri al S-Pordego<sup>4</sup>.

La norda vento mildiĝis post iom da tempo. Ĝi forportis kun si ĉiun polveron kaj kuŝis antaŭ mi nur pura, blanka strato. La rikiŝisto kuris pli rapide. Ĝuste kiam ni estis atingontaj S-Pordeon iu subite kroĉiĝis al la rikiŝo-timoneto kaj falis malrapide sur la teron.

La falinto estis maljuna virino, grizhara kaj ĉifon. Ŝi venis de la vojrandoj kaj subite transkuris la vojon ĝuste antaŭ la rikiŝo. Mia rikiŝisto jam ŝin evitis, sed ŝia ŝirita vatveŝto ne butonita estis flirtanta en la vento kaj fine kroĉiĝis sur la rikiŝo-timoneton. Feliĉe la rikiŝisto jam malrapidigis iom sian kuron: alie certe ŝi estu falinta sur la kapon kaj probable serioze vundita<sup>5</sup>.

Ŝi kuŝis tere sur la ventro<sup>6</sup>. La rikiŝisto haltis. Mi estis certa ke la maljunulino ne vundiĝis; cetere neniu vidis la akcidenton. Ĉagrenis min<sup>7</sup>, ke la rikiŝisto senbezzone haltis kaj videble mem involviĝos en komplikajon, kaj prokrastos ankaŭ mian veturon.

“Estas nenio,” mi diris al li. “Iru plu!”

Li tute ne atentis—aŭ ne aŭdis—sed lasis la timoneton, helpis ĝentile la maljunan virinon stariĝi kaj tenante ŝian brakon li demandis:

“Kio estas al vi?”<sup>8</sup>

“Mi vundiĝis.”

Mi pensis: “Mi vidis vin fali malrapide. Kiel vi povus vundiĝi? Estas nur ŝajnigo, vere abomeninda<sup>9</sup>. La rikiŝisto tute senbezone faras al si malagrablaĵon. Nu, li mem serĉu nun elirejon.”

Aŭdinte kion ŝi diris, la rikiŝisto neniom hezitis, sed ankoraŭ tenante ŝian brakon, ekiris kun ŝi paŝo post paŝo antaŭen. Mi iom miris kaj, rigardante antaŭen, vidis policejon, ekster kiu troviĝis ankaŭ neniu post la ventego. Kaj apogante la maljunulinon la rikiŝisto ĝuste direktis sin al ĝia pordego.

Tiam mi ekhavis strangan senton. Ŝajnis<sup>11</sup> al mi, ke lia polvokovrita figuro subite gigantiĝis kaj ju pli li iras, des pli li grandiĝas, ke mi devas levi la kapon por lin vidi. Kaj al mi li fariĝis iom post iom impona premo, kiu eĉ elpremus la “malgrandecon” kaŝitan sub mia peltorobo.

Dume mia viviforto probable iom stagnis. Mi sidis senmove kaj senpense, ĝis mi vidis elvenanta<sup>12</sup> el la policostacio policanon, kaj nur tiam elrikiŝiĝis.

“Luu alian rikiŝon,” diris la policano alproksimiĝante al mi. “Li ne plu povas vin porti.”

Sen pensado I prenis plenmanon da kupraj moneroj el la poŝo, etendis al la policano kaj diris: “Bonvolu doni al li...”

La vento plene ĉesis. Ankoraŭ estis tre silente sur la strato. Mi iris meditante, sed preskaŭ timis pensi pri mi mem. Lasu flanken la pli fruan okazintaĵon. Sed kion signifas la plenmano da kupraj moneroj? Ĉu mi donis ilin kiel premion? Ĉu mi povas juĝi la rikiŝiston? Mi ne povas respondi al mi mem.

Eĉ nun mi ofte rememoras tiun incidenton. Ofte spitante doloron, mi penas pensi pri mi mem. El la politikaj kaj militaj eventoj de la lastaj jaroj, same kiel el la klasikaj libroj, studitaj en mi infanaĝe, mi jam delonge ne povas ripeti parkere eĉ duonfrazon. Sole ĉi tiu malgranda incidento ŝvebas ĉiam antaŭ miaj okuloj, kelkfoje male des pli klare, min hontigante, urĝante al sinrenovigo, kaj pliigante mian kuraĝon kaj esperon.

(de Lusin, Ĉinio)

## 注 释

1. de kiam mi venis... 时间状语从句。
2. sufiĉe da tiel nomataj gravaj ŝtateventoj 够多的所谓国家大事, sufiĉe da = sufiĉe multe da.
3. la sesa jaro de la Respubliko 民国六年。
4. S-Pordego S 城门, 鲁迅小说中常用英文字母代替一些专名, 这里 s 可能是 south 的第一个字母, 那么 S-Pordego = la suda pordego 南门。
5. fali sur la kapon 摔在头上, 人倒下来头摔在地上, 摔了头。
6. kuŝi tere sur la ventro 与上句一样, 状语 sur la ventro 表示动作接触的地方, 即肚子贴地躺着, 爬在地上。
7. ĉagrenis min 句中没有主语, 其后连词 ke 引起的从句是主语从句。
8. 你怎么啦?
9. Estas nur ŝajnigo, vere abomeninda = Tio estas nur ŝajnigo kaj vere abomeninda.

10. Kion ŝi diris 是状语分词副词的宾语从句。
11. ŝajnis, giantiĝis 表示故事中陈述的事实，故用过去时，而 iras, grandiĝas 和 devas 用现在时表示作者当时的直感，使描写的事情仿佛就在读者的眼前似的。
12. elvenanta 是宾语 policanon 的表语：mi vidis policanon elvenanta el la policostacio = mi vidis, ke policano estis elvenanta el la policostacio.

## ĈIUTAGAJ PAROLTURNOJ KAJ ESPRIMOJ

### RESTORACIO

1. Ĉu vi povas rekomendi al mi iun bonan restoracion?
2. En Beijing estas multaj bonaj restoracioj.
3. Nun estas tempo manĝi (manĝotempo)!
4. Ni eniru ĉi tiun restoracion.
5. Ĉu tiu ĉi tablo estas libera?
6. Bonvolu, ĝi estas libera.
7. Tiu ĉi tablo estas rezervita.
8. Tiu ĉi loko estas okupita.
9. Ni sidiĝu ĉi tie.
10. Per kio mi povas servi al vi?
11. Kion vi havas hodiaŭ por tagmanĝo?
12. Ĉu vi deziras pretan pladon, aŭ farotan laŭ la menukarto?
13. Bonvolu doni al ni la menuon.
14. Nu, du kalikojn da brando.
15. Mi plej volonte manĝas viandajn pladojn.
16. Mi preferas freŝajn pladojn.
17. Mi tre ŝatas kradrostitan viandon.
18. Ĉu mi alportu al vi iun antaŭmanĝon?
19. Mi petas haringojn en olivoleo kaj bifestekon laŭ la rusa maniero.
20. Ĉu mi povas peti dupladan tagmanĝon kun deserto?
21. Por la unua plado mi petas buljonon, por la dua plado mi petas kotleton laŭ la viena maniero.
22. Bonvolu doni al mi...
23. Mi prenos ĉi tiun pladon, kaj sekve deserton kaj kafon.
24. Mi petas vegetaran pladon kaj vinon.
25. Mi petas glason da biero (da sodakvo).
26. Mi volonte prenos unu kalikon da ĉina brando.
27. Ĉu estas legomoj por la viando?
28. Ne estas, estas nur saŭco.
29. Kion vi deziras por la deserto?
30. Mi petas glaciaĵon kaj kafon.
31. Mi deziras pagi.
32. Kiom mi pagas?
33. Ĉu vi, sinjoroj, pagas kune, aŭ aparte?

34. Kune.
35. Ciu pagas aparte.

## 日常用语和句型

### 餐 厅

1. 您能给我推荐一家好饭馆吗?
2. 北京有很多好饭馆。
3. 现在是进餐的时候了。
4. 我们进这家餐馆吧。
5. 这张桌子空吗?
6. 请吧, 它是空的。
7. 这张桌子是保留的(被人预定了)。
8. 这位子有人。
9. 咱们坐这儿吧!
10. 您要点什么?
11. 今天午餐你们有什么(菜)?
12. 您要快餐还是点菜?
13. 请把菜谱给我们。
14. 嗯, 来两杯白兰地。
15. 我最喜欢吃肉菜。
16. 我喜欢鱼菜。
17. 我非常喜欢叉烧肉。
18. 要我给您送点餐前小吃吗?
19. 我要一个橄榄油炸鲑鱼和一个俄式牛排。
20. 我可以要两道菜加尾食的(一份)午餐吗?
21. 第一道菜我要肉汤, 第二道菜要维也纳式软炸肉。
22. 请给我……
23. 我要这个菜, 然后来尾食和咖啡。
24. 我要一个素菜, 外加葡萄酒。
25. 我要一杯啤酒(一杯汽水)。
26. 我愿要一杯中国白酒。
27. 肉(菜)里有蔬菜吗?
28. 没有, 只要佐料。
29. 尾食您要点什么?
30. 我要冰激凌和咖啡。
31. 我要付款。
32. 我该付多少?
33. 先生们, 你们是单付还是算在一起?
34. 算在一起。
35. 各人单付。各付各的。

## 语 法

### 状语从句

状语从句是主句中的状语引申而成的从句，是以一个句子的形式来作主句中的状语。状语的修饰动词或词组，它的功用是说明谓语动作或状态发生的时间、地点、原因、目的、结果、条件或方式方法等的，由于状语本身有这样多的功用，它引申出来的从句也就有同样的许多种。不同的这样从句要用不同的连词或关系词来连接。状语从句有八九种之多，每种状语从句又都各有若干常用的连词或关系词来与主句连接，这样它们的连接词就有几十个，显得纷乱。但不管其如何多，总可以找到一些共同的规律。下面试着归纳一下：

一、状语从句等于状语，状语是副词性的句子成分。

二、既然状语从句等于状语，那么，状语从句也就是副词性的句子了。

三、既然是副词性的句子，那么连接它的词除连词外一定是副词性的相关词。

为了条理清楚，下面还是按不同的状语从句分别举例说明：

一、时间状语从句

连接时间状语从句的词基本上是时间副词 *kiam*，有时也用其它时间副词或连词 *se*，*dum*，*ol* 等，如：

**Kiam profesoro Wang venis al nia universitato, (tiam ni varme lin bonvenigis.**

当王教授来到我们大学时，我们热烈欢迎他。

**Tagiĝis (tiam), kiam ili hejmen revenis el la laborejo.**

当他们从单位回到家里时，天已亮了。

**Kiomfoje li ŝin rememoris, liaj okuloj pleniĝis de larmoj.**

每当他想起她时，他眼里就满含泪水。

**Mi trovis lin ĉiam ĉe laboro, kiam mi lin vizitis.**

我每次来访，发现他总是在工作。

**Ĉiufoje, se li venas, li alportas donacon.**

他每次来都带着礼物。

**Dum vi skribos la leteron, mi legos libron.**

在你写信的时候，我将读书。

**Post kiam ni atingis, ŝi trovis sian ŝlosilon.**

在我们抵达之后她才找到自己的钥匙。

**Post ol la presidanto malfermis la kunsidon, oni komencis la tagordon.**

主席宣布开会之后，大家开始讨论日程。

**Tuj kiam li ekaŭdis la vkrion, li alkuris.**

刚一听见呻吟声，他马上跑了过去。

**Baldaŭ kiam li venis en la salonon, oni lin prezentis al la mastrino.**

他进入客厅不久就有人把他介绍给女主人。

**La kuracisto venis, kiam la malsanulo jam mortis.**

病人死了医生才来。

**Kiam mi finis mian laboron, mi iris por tagmanĝi.**

我干完工作后才去吃午饭。

**Kiam mi ellegis la libron, mi ĝin vendis.**

那本书我读完以后就把它卖了。

**Kiam ĉe la pordo aperis la figuro de la instruisto, la tri studentoj iris al li renkonte.**

当门口出现老师的身影时，那三个学生迎上前去。

**Antaŭ ol li aperis ĉe la pordo, oni jam aŭdis lian severan parolon.**

他人还未出现，可大家已听见他那严厉的话音。

## 二、地点状语从句

连接地点状语从句的词基本上是地点副词 **kie**，如：

**Li iris (tien), kien mi intencas iri.**

他到我想去的地方去了。

**Kuru ĝis tie, kie la flago estas fiksita.**

跑到（立）有旗子的地方去。

**Ni sidiĝu (tie), kie estas ombro.**

我们坐到阴凉的地方去吧。

**Li iris (ĝis tie), ĝis kie neniu povis iri antaŭe.**

他到过从前没有人能去的地方。

## 三、原因状语从句

连接原因状语从句的词是连词 **ĉar**，**pro tio**，**ke**，如：

**Mi ne povas tien iri, ĉar mi estas malsana.**

我不能到那里去，因为我病了。

**Hieraŭ nokte mi malbone dormis, ĉar la najbaroj senĉese bruadis.**

昨夜我没有睡好，因为邻居不停地闹嚷。

**Vi fiaskis pro tio ke vi ne obeis mian konsilon.**

你之所以失败是因为你不听从我的劝告。

## 四、目的状语从句

连接目的状语从句的词是 **por (tio) ke**，如：

**Ili faris ĉion eblan, por ke li sentis sin hejme en ilia domo.**

他们尽量使他感到在他们家里就像在自己家里一样。

**Mi venis por tio, ke ni fine aranĝu la aferon.**

我来的目的是把我们的事情最终安排好。

**Mi donis al li monon ne por tio, ke li ĝin fordiboĉu.**

我给他钱不是为了让他挥霍。

在目的状语从句、时间状语从句或原因状语从句里，如果主句和从句的主语是同一人，则可以把从句简化为介词短语，如：

**Mi venis por tio, ke mi diru al vi...**

**Mi venis por diri al vi...**

我来是为了告诉你.....

**Mi ne povas tien iri, ĉar mi estas malsana.**

**Mi ne povas tien iri pro (mia) malsano.**

我因病不能到那里去。

**Hieraŭ antaŭ ol li dormis, li trinkis limonadon.**

**Hieraŭ antaŭ ol dormi, li trinkis limonadon.**

昨天临睡之前他喝了柠檬水。



## 五、结果状语从句

连接结果状语从句的词是连词 **ke**，如：

La nokto estas tiel malluma, **ke** li nenion povis vidi.

夜是那样的黑，以致我们什么也看不见。

Tiom li malfortiĝis, **ke** eĉ sian manon li ne povis levi.

他是如此虚弱，以致连自己的手都抬不起来。

Li kriegis, **ke** li tute raŭkiĝis.

他大声喊叫，以致嗓子都完全嘶哑了。

Mi volis tiel aranĝi la aferon, **ke** ĉiuj estu kontentaj.

我要那样安排这件事，使所有的人都满意。

## 六、条件状语从句

连接条件状语从句的词是连词 **se**, **kondiĉe ke** 如：

**Se** ĝis la tria vi ankoraŭ ne venos, do nia kunveno ne okazos hodiaŭ kaj prokrastos ĝis la venonta dimanĉo.

如果三点你还不来，那么我们的座谈会今天就不举行了，改到下星期天。

Mi iros al vi ĉivespere, **se** mi estos libera.

我今晚到你那里去，如果我有空的话。

**Se** li vere skribis la leteron, li do certe ĝin dorsendis.

如果他真的写了信，那他肯定把它发出了。

Mi iros tien, nur **se** oni min speciale invitos.

Mi iros tien, nur **kondiĉe ke** vi min speciale invitos.

只有在人们特意邀请我的条件下我才到那里去。

Mi helpos vin, **se** vi min obeos.

Mi helpos vin, **kondiĉe ke** vi min obeos.

只要你听我的话，我就帮助你。

## 七、方式状语从句

连接方式状语从句的词是连词 **ke** 或关系词 **kiel**，如：

Tiel li foriris, **ke** li eĉ ne rerigardis.

他甚至连头也不回就这样走了。

La laboro estis farata tiamaniere, **ke** ĉiu faris sian taskon aparte.

这项工作是这样进行的，即每人分别完成自己的任务。

Li kuris tiel rapide, **kiel** li povis.

他拼命地奔跑。

如果从句和主句的主语是同一人，则从句可以简化为状语词组，也可用分词副词，如：

Li foriris eĉ ne rerigardante.

他头也不回地走了。

Ĉiu laboris farante sian taskon aparte.

每人都用分别完成自己的任务来工作。

Li kuris laŭeble rapide.

他尽快地奔跑。

## 八、比较状语从句

比较状语从句是副词比较级的引申，主句和从句进行比较，主句用 **tiel**, **tiom**, 从句用 **kiel**, **kiom** 来呼应和连接，如：

**Mi amas ŝin tiel, kiel ŝi min amas.**

我如同她爱我一样地爱她。

**Ŝi zorgis pri ŝi (tiel), kiel oni zorgas pri filino.**

她像人们关心女儿一样地关心她。

**Disiĝi estas tiel same dolore, kiel (doloro estas) enterigi.**

分离是和死别同样地痛苦。

**Li verkas siajn poemojn tiel turmente, kiel virino naskas infanon.**

他作诗就像女人生孩子一样地难受。

**Mi gajnis tiom, kiom vi perdis.**

你之所失即我之所得。

**Kiom da kapoj, tiom da opinioj.**

有多少人就有多少意见。

### 九、让步状语从句

连接让步从句的词是连词 **kvankam** 或 **malgraŭ (tio) ke, spite (de tio) ke, eĉ se** 等，如：

**La herbo estas tute seka, kvankam antaŭ nelonge pluvis.**

虽然不久前下过雨，草仍完全是干的。

**Mi amas lin, kvankam li estas sentaŭgulo.**

他虽然是个废物，我仍然爱他。

**Estis varmege, malgraŭ ke blovis vento.**

尽管有风，天气还是很热。

**Li bone plenumis la taskon, spite ke oni malpermesis.**

不顾人们的阻止，他都出色地完成了任务。

**Ŝnuro ŝiriĝis, eĉ se ĝi estas dika.**

绳子即使是很粗，也会扯断。

**Eĉ se la ĉielo defalus, ni ne ektimus.**

即使天塌下来，我们也不怕。

## EKZERCOJ

### A. Respondu jenajn demandojn:

1. Kiam okazis la malgranda incidento al s-ro Lusin?
2. Kiam humoron havis s-ro Lusin dum tiu tempo?
3. Kia estis la vetero, kiam okazis la incidento?
4. Per kio s-ro Lusin veturis?
5. Kio okazis, kiam la rikiŝo estis atingonta S-Pordegon?
6. Kiu falis surteren?
7. Kion faris la rikiŝisto, kiam la maljunulino diris, ke ŝi vundiĝis?
8. Kial s-ro Lusin opiniis, ke tio estas nur ŝajnigo?
9. Kian senton s-ro Lusin havis poste, kiam li rememoris la incidenton?
10. Kion vi faros, se vi renkontos similan incidenton?

### B. Verku laŭeble longan konversacion kun temo ke vi renkontas amikon kaj invitas lin manĝi

kune kun vi en restoracio.

C. Ĉinigu jenajn vortojn kaj uzu ilin korekte por verki frazojn:

elmeti	alkutimiĝi	allogi	alveni
aliri	alparoli	aldoni	alporti
demeti	dekutimiĝi	delogi	deflankiĝi
deteni	depreni	delonge	denaska
devojiĝi	deveni	deiri	denove
prilabori	priskribi	pripensi	prikanti
priŝteli	prilumi	primoki	priparoli

Ĉ. Korektu erarojn en jenaj frazoj:

1. La kongreso komenciĝis la 3-a de aŭgusto.
2. En la salono regis viglan atmosferon (气氛).
3. Kiel abonanto de via gazeto bonvolu publikigi mian anonceton.
4. Li faris decidon, kiu mutigis (使哑) sian edzinon pro mirego.
5. La rakontoj, kiujn li skribis dum lia libertempo, estas tre amuzaj.
6. La sekretario elparolis vortojn jam de longe atenditaj.
7. Ĉesu vian petoladon (顽皮).
8. Niaj gastoj ne ankoraŭ alvenis.
9. Mia amiko montris min bonan libron.
10. Multaj studentoj estas en la biblioteko.

D. 本课正文是鲁迅先生的一篇小说。请先把它译成中文。与原著对照，看看你译得对不对。然后再把原著译成世界语，与课文对照，看你的译文与课文有什么不同的地方，找找原因，从中学习用词构句的技巧和翻译能力。

## LECIONO 18

### Novaj Vortoj

reĝo	国王	elspezi (tr)	开支, 支出
ornami (tr)	装饰	surtuto	(长) 外衣
trompi (tr)	欺骗	teksti (tr)	织
ŝtofo	织物, 布料	desegni (tr)	描绘
delikata	精美的, 纤细的	silko	丝
preta	准备好的, 现成的	pacienco	耐心
najbaro	邻人	fadeno	线
ruza	狡猾的	admiri (tr)	赞美
terura	可怕的	aprobi (tr)	认可, 赞成
observi (tr)	观察; 遵守	konfesi (tr)	承认
kavaliro	骑士	kruco	十字架
titolo	头衔, 称号	sekreta	秘密的
paradi (ntr)	游行; 夸耀	kandelo	蜡烛
eminenta	卓越的, 高级的	pantalono	裤子
mantelo	斗篷	araneo	蜘蛛
spiegulo	镜子	kokso	臀部
treni (tr)	拖, 牵	baldakeno	宝盖
ceremonio	仪式	ĉambelano	侍臣
piki (tr)	刺		

## LEGAĴO

### LA NOVAJ VESTOJ DE LA REĜO

Antaŭ multaj jaroj<sup>1</sup> vivis unu reĝo<sup>2</sup>, kiu<sup>3</sup> tiel amis belajn novajn vestojn, ke<sup>4</sup> li elspezadis sian tutan monon, por<sup>5</sup> nur esti ĉiam bele ornamita. Li ne zorgadis pri siaj soldatoj, nek pri teatro kaj ĉaso, esceptinte nur se<sup>6</sup> ili donadis al li okazon montri siajn novajn vestojn. Por ĉiu horo de la tago li havis apartan surtuton, kaj kiel pri ĉiu alia reĝo oni ordinaro diras: “Li estas en la konsilanejo,”<sup>7</sup> oni tie ĉi ĉiam diradis: “La reĝo estas en la vestejo.”

En la granda urbo, en kiu li loĝis, estis tre gaje; ĉiun tagon tien venadis multaj fremduloj.<sup>8</sup> Unu tagon venis ankaŭ du trompantoj, kiuj diris, ke ili estas teksistoj kaj teksas la plej belan ŝtofon, kiun oni nur povas al si prezenti<sup>9</sup>; ke ne sole la koloroj kaj desegnoj de tiu ĉi ŝtofo estas eksterordinare belaj, sed la vestoj, kiujn oni preparas el tiu ĉi ŝtofo, havas la mirindan econ, ke<sup>10</sup> al ĉiu, kiu<sup>11</sup> ne taŭgas por sia ofico aŭ estas tro malsaĝa, ili restas nevideblaj.

“Tio ĉi estas ja bonegaj vestoj!” pensis la reĝo, “havante tian surtuton, mi ja povus sciiĝi, kiu<sup>12</sup> en mia regno ne taŭgas por la ofico, kiun<sup>13</sup> li havas; mi povus diferencigi la saĝajn de la malsaĝaj! Jes, la ŝtofo devas tuj esti teksita por mi! Kaj li donis al la ambaŭ trompantoj grandan sumon da mono antaŭe, por ke<sup>14</sup> ili komencu sian laboron.

Ili starigis du teksilojn, faris mienojn kvazaŭ ili laboras<sup>15</sup>, sed havis nenion sur la teksiloj. Tamen en la postuloj ili estis tre fervoraj kaj postuladis la plej delikatan silkon kaj la plej bonan

oron. Tion ĉi ili metadis en siajn proprajn poŝojn kaj laboradis super la malplenaj teksiloj, kaj eĉ ĝis profunda nokto.

“Mi volus scii, kiom<sup>16</sup> de la ŝtofo ili jam pretigis!” ekpensis la reĝo, sed kaptis lin kelka timo ĉe la penso, ke<sup>17</sup> tiu, kiu<sup>18</sup> estas malsaĝa aŭ ne bone taŭgas por sia ofico, ne povas vidi la ŝtofon. Li estis kvankam konvinkita, ke<sup>19</sup> li pro si ne devas timi, tamen li preferis antaŭe sendi alian personon, por vidi, kiel<sup>20</sup> la afero staras. Ĉiuj homoj en la tuta urbo sciis, kian mirindan forton la ŝtofo havas, kaj ĉiu kun senpacienco jamm volis vidi, kiel malsaĝa lia najbaro estas.

“Mi sendos al la teksistoj mian maljunan honestan ministron!” pensis la reĝo, “li la plej bone vidos, kiel<sup>21</sup> la ŝtofo elrigardadas<sup>22</sup>, ĉar li estas homo saĝa kaj neniu pli bone taŭgas por sia ofico, ol li!”

Tiel la maljuna bonkora ministro iris en la salonon, en kiu<sup>23</sup> la ambaŭ trompantoj sidis antaŭ la malplenaj teksiloj kaj laboris. “Dio, helpu al mi!” ekpensis la maljuna ministro, larĝe malfermante la okulojn, “mi nenion povas vidi!” Sed li tion ĉi ne eldiris.

La ambaŭ trompantoj petis lin alveni pli proksime kaj demandis, ĉu<sup>24</sup> ĝi ne estas bela desegno kaj belegaj koloroj. Ĉe tio ĉi ili montris la malplenan teksilon, kaj la malfeliĉa ministro uzis ĉiujn fortojn por malfermi bone la okulojn, sed li nenion povis vidi, ĉar nenio estis.

“Mia Dio!” li pensis, “ĉu mi estas malsaĝa? Tion ĉi mi neniam supozis kaj tion ĉi neniu devas sciiĝi! Ĉu mi ne taŭgas por mia ofico? Ne, neniel mi povas rakonti, ke mi ne vidas la teksaĵon!”

“Nu, vi ja nenion diras! Rimarkis unu el la teksantoj.

“Ho, ĝi estas bonega, tre ĉarma!” diris la maljuna inistro kaj rigardis tra siaj okulvitroj. “Tiu ĉi desegno kaj tiuj ĉi koloroj!<sup>25</sup> Jes, mi raportos al la reĝo, ke<sup>26</sup> ĝi tre al mi plaĉas!”

“Tre agrable al ni!”<sup>27</sup> diris la ambaŭ teksistoj kaj nomis la kolorojn kaj komprenigis la neordinaran desegnon. La maljuna ministro atente aŭskultis, por povi diri tion saman, kiam li revenos al la reĝo; kaj tiel li ankaŭ faris.

Nun la trompantoj postulis pli da mono, pli da silko kaj oro, kion ili ĉiam ankoraŭ bezonis por la teksaĵo. Ili ĉion metis en sian propran poŝon, en la teksilon ne venis eĉ unu fadeno, sed ili, kiel antaŭe, daŭrigadis labori<sup>28</sup> super la malplenaj teksiloj.

La reĝo baldaŭ denove sendis alian bonkoran oficiston, por revidi, kiel iras la teksado kaj ĉu la ŝtofo baldaŭ estos preta. Estis kun li tiel same, kiel kun la ministro: li rigardadis kaj rigardadis, sed ĉar krom la malplena teksilo nenio estis, tial li ankaŭ neniion povis vidi.

“Ne vere,<sup>29</sup> ĝi estas bela peco da ŝtofo?” diris la trompantoj kaj montris kaj klarigis la belan desegnon, kiu<sup>30</sup> tute ne ekzistis.

“Malsaĝa mi ne estas!” pensis la sinjoro, “tial sekve mi ne taŭgas por mia bona ofico. Tio ĉi estas stranga, sed almenaŭ oni ne devas tion ĉi lasi rimarki!”<sup>31</sup> Tial li laŭdis la ŝtofon, kiun li ne vidis, kaj certigis ilin pri sia ĝojo pro la belaj koloroj kaj la bonega desegno. “Jes, ĝi estas rava!” li diris al la reĝo.

Ĉiuj homoj en la urbo parolis nur pri la belega ŝtofo.

Nun la reĝo mem volis ĝin vidi, dum ĝi estas ankoraŭ sur la teksiloj. Kun tuta amaso da elektitaj homoj, inter kiu<sup>32</sup> sin trovis ankaŭ la ambaŭ maljunaj honestaj oficistoj, kiu<sup>33</sup> estis tie antaŭe, li iris al la ruzaj trompantoj, kiuj nun teksis per ĉiuj fortoj, sed sen fadenoj.

“Nu, ĉu tio ĉi ne estas efektive belega?” diris ambaŭ honestaj oficistoj. “Via Reĝa Moŝto nur admiru, kia desegno, kiaj koloroj!” kaj ĉe tio ĉi ili montris sur la malplenan teksilon, ĉar ili pensis, ke la aliaj kredeble vidas la ŝtofon.

“Kio tio ĉi estas!” pensis la reĝo, “mi ja nenion vidas! Tio ĉi estas ja terura! Ĉu mi estas

malsaĝa? Ĉu mi ne taŭgas kiel reĝo? Tio ĉi estus la plej terura, kio povus al mi okazi.” “Ho, ĝi estas tre bela,” diris tiam la reĝo laŭte, “ ĝi havas mian plej altan aprobon!” Kaj li balancis kontente la kapon kaj observadis la malplenan teksilon; li ne volis konfesi, ke li nenion vidas. La tuta sekvantaro, kiun li havis kun si, rigardadis kaj rigardadis, sed nenion pli rimarkis ol ĉiuj aliaj, tamen ili ĉiam ripetadis post la reĝo: “Ho, ĝi ja estas tre bela!” Kaj ili konsilis al li porti tiujn ĉi belegajn vestojn el tiu ĉi belega materialo la unuan fojon ĉe la solena irado, kiu estis atendata. “Rava, belega, mirinda!” ripetadis ĉiuj unu post la alia<sup>34</sup> kaj ĉiuj estis tre ĝoja. La reĝo donacis al la ambaŭ trompantoj kavaliran krucon kaj la titolon de sekretaj teksistoj de la kortego.<sup>35</sup>

La tutan nokton antaŭ la tago de la parado la trompantoj pasigis maldorme kaj ekbruligis pli ol dek ses kandeloj. Ĉiuj povis vidi, kiel okupitaj ili estis je la pretigado de la novaj vestoj de la reĝo...

La reĝo mem venis al ili kun siaj plej eminentaj korteganoj, kaj ambaŭ trompantoj levis unu manon supren, kvazaŭ ili ion tenus, kaj diris: “Vidu, jen estas la pantalono! Jen estas la surtuto! Jen la mantelo! Kaj tiel plu. Ĝi estas tiel malpeza, kiel araneaĵo!”<sup>36</sup> Oni povus pensi, ke oni nenion portas sur la korpo, sed tio ĉi estas ja la plej grava eco!”

“Jes!” diris ĉiuj korteganoj, sed nenion povis vidi, ĉar nenio estis.

“Via Reĝa Moŝto<sup>37</sup> nun volu plej afable demeti Viajn plej altajn vestojn,” diris la trompantoj, “kaj ni al Via Reĝa Moŝto tie ĉi antaŭ la spegulo vestos la novajn.”

La reĝo demetis siajn vestojn, kaj la trompantoj faris, kvazaŭ ili vestas al li ĉiun pecon de la novaj vestoj, kiuj kvazaŭ estis pretigitaj; kaj ili prenis lin per la kokso<sup>38</sup> kaj faris kvazaŭ ili ion alligas—tio ĉi devis esti la trenaho de la vesto—kaj la reĝo sin turnadis kaj returnadis antaŭ la spegulo. “Kiel belege illi elrigardas<sup>39</sup>, kiel bonege ili sidas!”<sup>40</sup> ĉiuj diris. “Kia desegno, kiaj koloroj! Ĝi estas vesto de granda indo!”

“Sur la strato oni staras kun la baldakeno, kiun oni portos super Via Reĝa Moŝto en la parada irado!” raportis la ĉefa ceremoniestro.

“Nu, mi estas en ordo!” diris la reĝo. “Ĉu ĝi ne bone sidas?” Kaj ankoraŭ unu fojon li turnis sin antaŭ la spegulo, ĉar li volis montri, ke li kvazaŭ bone observas sian ornamon.

La ĉambelanoj, kiuj devis porti la trenajon de la vesto, eltiris<sup>41</sup> siajn manojn al la planko, kvazaŭ ili levas la trenajon. Ili iris kaj tenis la manojn eltirite en la aero; ili ne devis lasi rimarki,<sup>42</sup> ke ili nenion vidas. Tiel la reĝo iris en parada marŝo sub la belega baldakeno, kaj ĉiuj homoj sur la stratoj kaj en la fenestroj kriis: “Ho, ĉielo, kiel senkomparaj estas la novaj vestoj de la reĝo! Kian belegan trenajon li havas al la surtuto! Kiel bonege ĉio sidas!” Neniu volis lasi rimarki,<sup>43</sup> ke li nenion vidas, ĉar alie li ja ne taŭgus por sia ofico aŭ estus terure malsaĝa. Nenia el la vestoj de la reĝo ĝis nun havis tian sukceson.

“Sed li ja estas tute ne vestita!” subite ekkriis unu malgranda infano. “Ho ĉielo, aŭdu la voĉon de la senkulpeco!” diris la patro; kaj unu al la<sup>44</sup> alia murmuretis, kion la infano diris.

“Li estas tute ne vestita; tie staras malgranda infano, kiu diras, ke li tute ne estas vestita! Li ja tute ne estas vestita!” kriis fine la tuta popolo. Tio, ĉi pikis la reĝon, ĉar al li jam mem ŝajnis, ke al popolo estas prava; sed li pensis: “Nun nenio helpas, oni devas nur kuraĝe resti ĉe sia opinio!” Li prenis teniĝon ankoraŭ pli fieran, kaj la ĉambelanoj iris kaj portis la trenajon, kiu tute ne ekzistis.

(de H. Andersen, Danlando)

## 注释

1. 按现在的规范化用法 *multaj jaroj* 应改为 *multe da jaroj*。因为“许多年以前”强调的是数量“很多”，而 *multaj jaroj* 词组的中心词是名词 *jaroj*，*multaj* 只是其附属物，所以 *multaj jaroj* 是“许多不同的年”，强调的是 *jaroj*。在词的修饰关系上学员们学过这个道理，凡是词组必定有主要词（中心词和次要词（修饰词），词组的词义应以中心词为基础。*Multaj jaroj* 的中心词是 *jaroj*，而 *multe da jaroj* 的中心词是 *multe*。
2. 这里 *unu reĝo* 是受民族语原文的影响的用法，*unu* 起不定冠词的作用。世界语是没有不定冠词的，但许多民族语是有不定冠词的，因此有的人主张世界语里也用不定冠词，并指出 *iu* 作此功能，但大多数人都不同意。因为不定冠词从逻辑上来说是多余的。如这句去掉 *unu* 完全可以，况且 *reĝo* 后边还带有修饰语从句。学员自己造句写文章时不要学这种加不定冠词的用法，如在翻译作品一定要用时，用 *unu* 比用 *iu* 较好。
3. *kiu* 引导的是 *reĝo* 的修饰语从句。
4. *ke* 引导的是方式状语从句，与主句的副词 *tiel* 呼应，修饰 *amis*。
5. *por* 引导的目的状语从句。后边 *se* 引导的是让步状语从句。
6. *surtuto* 是男式穿在外面的长大衣服，这里指的是国王的外衣、外套。古代国王的外衣上面有许多装饰品，如后面提到的“拖带”即是其一。
7. *konsili* 是“劝告”“参议”，*konsilanto* 是“参议员”“顾问”，*konsilanejo* 在这里是指“宫廷议事厅”。
8. *fremda* 陌生的，外国的，异乡的，*fremdulo* 外地人，外国人。
9. *prezenti* 是把好东西呈献给人。这里是说由于织的料子太漂亮太好了，只好留给自用，舍不得给人。
10. *ke* 引导的是修饰语从句，修饰宾语名词 *econ*，与 *mirindan* 相呼应，说明值得惊异的特性是什么样子的。
11. *kiu* 引导的是（与格）状语从句，它是主句与格状语 *al ĉiu* 的同位语，是说明 *ĉiu* 的，*kiu* 与 *ĉiu* 呼应。
12. *kiu* 在这里是疑问词，导入宾语从句 [注意：主句的动词 *sciiĝi* = *sci-iĝ-i*，与一般构词法不同，*-iĝ-I* 在这里并不是把及物动词变为不及物动词，而是表示动作的瞬间过程，*sciiĝi* = *ekscii* 开始知道，知道了，它仍可以跟宾语，不过它的宾语只能用间接宾语（*pri...*）而这种用直接宾语（*-n*），但当宾语扩大为从句时，就不分直接间接了。]
13. *kiun* 导入修饰语从句。
14. *por ke* 导入目的状语从句。
15. *kvazaŭ* 导入的是比较状语从句。连词 *kvazaŭ* 好像，仿佛，表示的是违反事实的比较，按现在规范的用法其从句的动词应用假定式：*kvazaŭ ili laborus*。
16. 疑问副词 *kiom* 导入的是宾语从句。学员在初级 *keb1* 里学过 *kiom...da* 结构，对 *kiom...de* 比较陌生。其实关于 *da* 和 *de* 的区别是讲过的，如：  
*glaso da vino* 一杯酒（强调数量：一杯）  
*glaso de vino* 酒杯（强调所有、用途：喝酒的杯子）  
据此，*kiom da ŝtofo* 多少衣料  
*kiom de la ŝtofo* 那匹料子的多少（*kiom de la ŝtofo ili jam pretigis* 那匹料子他们已织好了多少）。

- 还有一点区别：kiom da 后的可数名词都要用复数，kiom de 后则不必了。
17. ke 引导的是修饰语从句。
  18. kiu 引导的是主语从句。
  19. ke 导入的是宾语从句。原句的结构是 Li estis kvankam konvinkita (pri tio), ke...
  20. 两个副词 kiel 导入的都是疑问句，作宾语从句。
  21. 这里的 kiel 导入的也是宾语从句。
  22. elrigardi = aspekti 外貌，相貌。（料子看来怎么样？料子好看不好看？）
  23. en kiu 导入的是修饰语从句，修饰名词 salonon。
  24. ĉu 导入的是宾语从句。
  25. 这是口语中的表示赞叹的片语，单独使用简短生动，具有强烈的感情。没有必要再去分析其句子成分了。
  26. ke 导入的是宾语从句。
  27. Tre agrable al ni = Estas tre agrable al ni (ke vi tiel laŭdas ĝin kaj ke ĝi al vi tre plaĉas...).
  28. daŭrigadis labori 有语病，因为 daŭri = esti plue, ne esti finita, 所以只能说 la laboro daŭras (工作在继续) 或 mi daŭrigas mian laboron (我在继续工作)。这里应改成 daŭrigadi sian labron。
  29. 这里省去了一个连词 ke, 全句应是 (Ĉu estas) ne vere, ke ĝi...
  30. kiu 导入的是个修饰语从句。
  31. oni ne devas tion ĉi lasi rimarki 应改为: oni devas ne lasi iun tion ĉi rimarki。
  32. inter kiuj 导入的也是修饰语从句。
  33. kiuj 导入的也是修饰语从句。
  34. unu post la alia 改为 unu post alia。Unu post alia 一个个地 (人数众多), 而 unu post la alia 两人先后地 (只有两个人)。
  35. kavalira kruco 骑士十字勋章: sekreta 秘密的, 可以引申为“私人的”, sekreta teksisto de la kortego 皇宫御用织师。
  36. araneaĵo 蜘蛛网。
  37. Via Reĝa Moŝto 国外陛下。要全大写。
  38. preni lin per la kokso 扶着他的臀部。
  39. kiel 在这里是作感叹词用, 表示赞叹: 多么.....啊! elrigardi = aspekti。
  40. sidi 坐着, 在衣着上指是否合身。
  41. eltiri = etendi 伸出。
  42. ili ne devis lasi rimarki 改为 ili devas ne lasi iun rimarki。
  43. Neniu volis lasi rimarki 改为 neniu volis lasi iun rimarki。
  44. unu al la alia 去掉冠词, 改为 unu al alia。

## ĈIUTAGAJ PAROLTURNĴOJ KAJ ESPRIMOJ

### DEMANDI PRI VOJO

1. Ĉe kiu strato troviĝas...?
2. Pardonu, sinjoro, kie estas...?
3. Kie troviĝas la hotelo...?  
—la Urbodomo?



- la parlamentejo?
  - la Imperiestas Palaco?
  - la Zoologia Ĝardeno?
  - la sidejo de ĈEL?
4. Mi tre pardonpetas, ĉu vi povas diri al mi, kie estas...?
    - kiel mi povas iri al...?
    - kie troviĝas...?
    - ĉu estas proksime de ĉi tie al...?
  5. Unue bonvolu iri dekstren, poste maldekstren kaj rekten.
  6. Ĉu ĉi-voje?
  7. Ne, tiu-voje.
  8. Ĉi-direkte (en tiu ĉi direkto)?
  9. Ne, en la kontraŭa direkto.
  10. La unua transversa strato maldekstre.
  11. Ĉu vi vidas tiun domon?
  12. Tie prenu la unuan straton dekstre.
  13. Ĉu ĝi estas malproksime?
  14. Jes, sufiĉe malproksime.
  15. Ĝi estas tute proksime, en la distanco de kvinminuta piediro for de ĉi tie.
  16. Vi devas transiri la straton.
  17. Ĝi troviĝas tutajpude (tujapude).
    - ĉe la stratangulo.
    - post (malantaŭ) tiu ĉi domo.
  18. Bedaŭrinde, mi ne povas helpi al vi, mi ne estas lokano.
  19. Mi ne scias.
  20. Pardonu, per kiu trolebuso (aŭtobuso) mi povas veturi al...?
  21. Bonvolu preni la trolebuson 102.
    - la rapidan aŭtobuson 103.
  22. Vi devas ŝanĝi kelkajn (veturilojn). Pli bone, ke vi prenu taksion.
  23. Kie estas la proksima haltejo de la trolebuso 102?
    - de la aŭtobuso 103?
  24. Bedaŭrinde, mi ne povas informi vin, bonvolu demandi policanon.
  25. Ĉu tiu ĉi aŭtobuso veturas al...?
  26. Ho jes, kompreneble.
  27. Ne, vi devas veturi per la trolebuso 102.
  28. Tiu ĉi aŭtobuso veturas en la kontraŭa direkto.
  29. Kie mi descendu?
  30. Mi deziras atingi... Bonvolu averti min, kiam mi eliru.
  31. Mi petas bileton al...
  32. Sinjoro, vi devas eliri ĉi tie.
  33. Vi devos eliri ĉe la sekva haltejo.
  34. Taksio! Bonvolu veturigi min al...
  35. Haltu momente ĉi tie.
  36. Bonvolu atendi min.

## 日常用语和句型

### 问 路

1. ……在哪条街？
2. 对不起，先生……在哪里？
3. ……，旅馆在哪里（市政所，国会，故宫，动物园，中华全国世界语协会在哪里）？
4. 非常对不起，您能告诉我，……在哪里吗？（我怎样才能去到……？……在哪里？从这儿到……近吗？）
5. 先向右拐，然后向左拐，一直走。
6. 是走这条路吗？
7. 不，走那条路。
8. 是这个方向吗？
9. 不，在对面那个方向。
10. 是左边第一条横街。
11. 你看见那幢房子了吗？
12. 到那边走右边第一条街。
13. 它远吗？
14. 是的，相当远。
15. 它就在附近，从这儿步行只有五分钟距离。
16. 你应该走到街那边（对面）去。
17. 它就在这旁边（在大街转角处，在这幢房屋后面。）
18. 抱歉，我不能帮忙，我不是本地人。
19. 我不知道。
20. 对不起，坐哪条无轨电车（公共汽车）我才能到……？
21. 请坐 102 无轨电车（103 快车）。
22. 你得换几趟车。最好叫辆出租汽车。
23. 102 无轨电车（103 公共汽车）的最近车站在哪里？
24. 真抱歉，我不能告诉你，请问问警察吧。
25. 这趟公共汽车是开往……的吗？
26. 哦，是的，当然。
27. 不，你该坐 102 无轨电车。
28. 这趟公共汽车是驶往相反方向去的。
29. 我该在哪儿下车？
30. 我去……，请告诉我，什么时候我该下车。
31. 我要一张去……的车票。
32. 先生，你该在这里下车。
33. 你该下一站下车。
34. 出租汽车！请送我到……！
35. 请在这儿停一下车。
36. 请等着我。

## 语 法

### 修饰语从句、宾语从句和主语从句小结 修饰语从句

名词的修饰词本书分为直接和间接两种，前者是形容词，后者是介词短语，这是从形式上来分的，在功用上它们都是修饰或补足名词的。当它们扩大引申为从句时，这种形式上的差别已经没有了，所以称为名词的修饰从句，它等同于一般所谓的定语从句。

与主语从句、宾语从句一样，名词的修饰语从句也可分为陈述句型、疑问句型和关系句型三种。陈述句型用连词 *ke* 来连接，如：

*La stato, ke mi devas vane atendi, ne daŭros longe*

我必须徒劳等待的状况 ŭ 不会很久了。

*Tiu aranĝo havas la avantaĝon, ke oni povas facile trovi ĉion.*

那种安排便于人们容易找到一切。

*Li revenis kun la informo, ke nenio grava okazis.*

他带回消息说，并未发生什么重大事件。

疑问句型用疑问副词来连接，如：

*La demando, ĉu Esperanto povas havi poezion, ne estas plu diskutebla.*

能否用世界语作诗的问题可以不再讨论了。

*La sciigo, kie li estas kaj kiam li revenos, ankoraŭ ne alvenis.*

他在哪里和什么时候回来的消息尚未收到。

*Mi ne ricevis de li ordonon, kiam mi revenu.*

我还未接到叫我何时返回的命令。

*Mi ne ricevis de li respondon, ĉu li volus aŭ ne.*

我未收到他愿意与否的答复。

关系句型用关系词 *kiu*, *kia*, *kies* 来连接，主句里与之相呼应的指示词 *tiu*, *tia* 等可以省略不用，从句要紧靠在所修饰的名词后面，如：

1. *La homo, kiu vin vizitis, estas mia amiko.*

访问过你的那人是我的朋友。

2. *Mi sendos al vi la libron, pri kiu mi parolis.*

我将把提到的那本书寄给你。

3. *La homo, kiun vi sendis, alvenis.*

你派的人到了。

4. *Mi vizitis la profesoron, kies libro vin tiom interesas.*

我去拜访了你十分欣赏其著作的那位教授。

5. *Mi vidis en butikojn, kie vi serĉas.*

我在铺子里看到了你要的那种铅笔。

上列五个从句除最后两句外，前面三个都可以换用分词形容词，变句子为修饰语词组：

*La homo vin vizitinta estas mia amiko.*

*Mi sendos al vi la libron de mi parolitan.*

*La homo de vi sendita alvenis.*

这三句之所以用分词替换是因为关系词 *kiu* 与前面的名词是同一事物，是同一人：

1. *kiu*            *La homo (Tiu homo)*

2. *pri kiu?*     *La libron (Tiun libron)*

### 3. kiun? La homo (Tiu homo)

Kiu 是代词，可以直接代替前面的名词。但是 4、5 两句里的 kies 和 kia 则不是代词，它们不能直接代替前面的名词。Kian 与 tian 相呼应，不等于 krapjonon，而 kies 则要改为 de kiu，才能代替前面的名词。

本书词法部分讲 kiu 时曾指出它单用时指人，作修饰语用时指个体。其实所谓单用也是省略了名词的用法，kiu 谁，是 kiu homo 哪一个人的简化。所以透过表面看，kiu 是作修饰语用的词。也就是说它是与形容词同功用的词。现在我们可以把它也看成形容词，这对本课从句的研究有帮助。

从上面的分析可以归纳出：

- 一、只有关系形容词才能连接修饰语从句的关系句型 (kio, kies 是形容词，kiu 作修饰语用时也相当于形容词)，
- 二、只有 kiu 连接的定语从句才能变为修饰语词组；
- 三、Kiu 是这种从句中用得最多的一种连接词。

在十六课曾试着讲了主语从句和宾语从句的区别方法，这一课又加上了修饰语从句，它们又各有三种句型，不把它们区分清楚，就无法搞清主从句的结构，还可能误解。特别是主语从句与修饰语从句有时不好分清。下面再试着提供一些区别要领：

- 一、主语从句的主句多是无主句或只有形式上的指示代词 tio, tiu 作主语，而真正的主语是后边 kio, kiu 或 ke, se 引出的从句。在其主句里不能出现名词或其它代词作主语。
- 二、修饰语从句的主句是有主语的。修饰语从句总是跟在主句的一个名词之后，不管该名词前面是否有 tiu。而且它的关系词只能是 kiu, kia, kies，只有在极个别的情况下(如省去物名词保留形容词 la sola 作名词用时)才用 kio 作其从句的关系词，如：

La sola, kion mi timis, estis...

我唯一担心的是.....

(注：kio 是代词，kiu 也是代词，它们的区别在于：一、kio 只能单用，不能修饰名词，而 kiu 既可单用，也可加在名词前面作修饰语。二、kiu 表示人或个体，而 kio 不能表示人或个体，它只能表示事物或物件(包括抽象概念)。三、作关系词用时 kiu 可以代替前面的名词，而 kio 则不能，它只能与前面的相关词 io, tio, ĉio 互指。

其实 kio 只是代词，只能起名词功用，而 kiu 可归到形容词里，因为 kiu 单用时也等于省去了后边的名词，如我们可以说：

Kiu (homo) estas tiu (homo)?

Kiun libron vi preferas?

但我们不能说：

Kio homo estas tio homo?

Kio libron vi preferas?

因为 kio 与名词不能组合。但 kio 作为代词还可以表示前句整句的概念，如：

Li ridas konstante, kio estas netolerebla.

他不住地笑，真令人受不了。

La kongresaj kunsidoj okazos en unu sola domo, kio multe helpas al a bona aranĝo.

大会的各种会议都可在同一幢大楼里进行，这大大有助于良好的安排。

- 三、在疑问句作从句时，主语从句用疑问代词或 ĉu 连接，而修饰语从句则用疑问副词或 ĉu 连接。

La sciigo, kie li estas kaj kiam li revenos, ankoraŭ ne alvenis.

他在哪儿和什么时候回来的通知还未到来。

### 表语从句

表语从句是句子中的表语引申扩大而成的从句。表语是与系动词组成谓语的句子成分，表语变成了从句，则它前面的主句中的谓语就只剩下系动词了，这是识别表语从句的重要标志。

连接表语从句的词有连词 **ke**，关系词 **kiu, kio, kia**，主句里可以用指示词 **tiu, tio, tia** 与之相呼应，但常常省略不用，如：

**La demando estas (tio), ke li nenion komprenas.**

问题是他什么也不懂。

**La kutimo de mia amiko estas (tio), ke li neniam malfruas.**

我朋友的习惯是从不迟到。

**Lia ordono estas (tio), ke ni eliru.**

他的命令是让我们出发。

**Ŝi estas (tiu), kiun vi serĉis.**

她就是你找的那个人。

**Hodiaŭ la vetero estas tia, kia hieraŭ estis.**

今天天气与昨天的一样。

**Tio estas (tio), kio kaŭzis lian fiaskon.**

那就是造成他失败的原因。

也可以用疑问词作表语从句，作表语从句用的疑问句用疑问副词 **ĉu, kiam, kiel** 等等造句和连接，主句的主语要用名词“问题” (**demando, problemo**)，如：

**La demando estas, kiam ni komencu la laboron.**

问题是我们什么时候开始这项工作。

**La problemo estas, ĉu ni iru aŭ restu.**

问题是我们走还是留下。

**La demando estas, kiel ni povu kontentigi ĉujn laŭpete.**

问题是怎样我们才能满足大家的要求。

在上面这些主句中也省去了处于表语地位的指示词 **tio**，后边的从句也是说明 **tio**，和 **tio** 互指的，比较上述所有的表语从句可以看出，它们总是主句里的那个指示词的代替物，指示词处于表语地位，因之代替它们的从句就是表语从句，但是表语与主语是同数同格的，常常可以互换地位，如互换地位，指示词处于主语地位时，那时代替它的从句就变成为主语从句了，如：

**Tio, ke li nenion komprenas, estas la demando.**

他什么也不懂，这就是问题所在。

**Tio, ke li neniam malfruas, estas la kutimo de mia amiko.**

(他)从不迟到是我朋友的习惯。

**Tiu, kiun vi serĉis, estas ŝi.**

你寻找的那个人就是她。

**Tio, kiam ni komencu la laboron, estas la demando.**

什么时候开始这项工作是我们的问题。

### 主从句小结

上面已分别讲了各种主从句的特点，并举例说明了它们的区别。分析主从句首先要把主

句找出来，找出主句看其中缺少什么成分，（当然，找出主句首先要弄清楚主句是什么句型，是主谓表，主谓宾，或是主谓状？然后再看缺少什么成分），如果主句里不缺句子成分，但其中某一成分不是实词而是指示词，则它就会有互指的从句，那个从句的性质就由该指示词所处的地位（在主句中的句子成分）来定。从句总是紧跟在与它互指的那个指示词后面的。

从句既然是主句中的某一句子成分，那么充任某一句子成分的词词性也决定从句的句性：如主语是由名词充任的，主语从句就是名词性从句；表语是由名词或形容词充任的，表语从句就有名词性从句和形容词从句两种；宾语是由名词充任的，宾语从句就是名词性从句；状语是由副词充任的，状语从句就是副词性从句。句性不同它们用以和主句连接的词，特别是关系词也就不同，换句话说，主语从句只能用相关代词连接，宾语从句也只能用相关代词连接，表语从句可用相关动词或形容词连接，而状语从句则只能用相关副词来连接。

用连词连接的从句，特别是用连词 **ke** 连接的从句情况比较复杂，那时主要看主句中缺少什么句子成分来定从句的句性，如果主句中有与从句互指的指示代词，则看该代词所处地位来决定是什么从句。判断疑问句的从句性质也可用这种办法。

以上是从句子结构上来判断的办法。当然，判断一个句子是什么主从句结构的根据还得看上下文和全句的含意。因此分析时也要注意全句的内容是否协调，上下文是否连贯。

下面再举几个例句试作分析：

**Mi vidis, ke li falis kaj lia vesto malpuriĝis.**

我看见，他摔倒了而且衣服也弄脏了。（宾语从句）

**Kiam mi venis en la ĉambro, mi vidis, ke li faris hejmtaskon.**

当我走进房间的时候，我看到他在做家庭作业。

第一个句子用 **kiam** 开始，全句不是疑问句，因此 **kiam** 不是疑问词而是关系词，因此它不是主句。最后一个句子是连词 **ke** 开头的，也肯定是从句不是主句。这样只剩下中间的句子 **mi vidis** 是主句，前后两句都是从句。主句的谓语 **vidis** 是及物动词，要求跟宾语，现在它后边没有宾语，而是跟着一个以 **ke** 引导的从句，因此 **ke...** 是它的宾语从句。前面的句子是用 **kiam** 连接的，不是时间，是个副词性句子，起状语作用。因此整句是个主谓宾状句型，是带时间状语从句和宾语从句的主从句。

**Mi faros ĉion, kion mi promesis, kvankam mi estas tre okupita per aliaj laboroj.**

虽然我其它工作很忙，我仍将完成我应许过的事情。

**Mi faros ĉion** 是主谓宾句型，不缺少什么句子成分，但 **ĉion** 是代词，意思太泛指，需要修饰，从句 **kion mi promesis** 就是修饰它的“我应许过的一切事情”，（**Mi faros ĉion, kion mi promesis = Mi faros ĉion promesitan**）最后 **kvankam** 引起的从句是让步状语从句。

**Mi sciis, ke li ne faros, kion li promesis.**

我知道他答应过的事情是不干的。

**Mi sciis** 是主谓宾句型，缺少宾语，后边 **ke** 引起的是宾语从句，而 **li ne faros** 又是主谓宾句型少宾语，后边关系词 **kion** 连接的又是它的宾语从句。

## EKZERCOJ

A. Respondu jenajn demandojn:

1. Kion la reĝo plej amis?
2. Kion diris la du trompantoj, kiuj venis en la urbon, kie la reĝo loĝis?
3. Ĉu la reĝo kredis tion, kion la trompantoj diris?
4. Kie la trompantoj laboris por la reĝo kaj kion ili postulis por la laboro?

5. Kiun sendis la reĝo unue por vidi, kiel iras la teksado?
6. Kial la reĝo decidis sendi la maljunan ministron?
7. Kion vidis la ministro kaj kial li jesis kaj laŭdis la ŝtofon, kiu ne ekzistis?
8. Kial la duafoje sendita oficisto same faris kiel la maljuna ministro?
9. Kial ĉiuj korteganoj kaj urbanoj unuanime laŭdis la efektive neezistantan novan veston de la reĝo?
10. Kion diris fine la malgranda infano? Ĉu lid iris veron? Kial la reĝo ne konfesis sian eraron kaj daŭre persistis en sia erara teniĝo?

B. Verku dialogon kun temo, ke paŝante sur strato vi renkontas fremdlandanon, kiu, vidante vian verdstelan insignon, vin salutes kaj demandas vin pri vojo ktp.

C. Kompletigu jenajn frazojn:

1. Temas pri...
2. Okazas, ke...
3. Mi estas ĝoja pro tio, ke...
4. Ŝajnas al mi, ke...
5. Venas al mi en la kapon, ke...

Ĉ. Korektu erarojn en jenaj frazoj:

1. Tiel estis la lernejo.
2. En la festvespero oni prezentis teatraĵeton, verkita de la prezidanto.
3. La ĉeestantoj larĝe malfermis iliajn monujojn por kunhelpi en la starigo de la asocio.
4. Ni legu tiun libron, ĉar ĝi estas grave koni la opinion de la aŭtoro.
5. Ili konsideris Esperanton kiel amika interligilo.
6. La nova kurso komencos post du semajnoj.
7. Ni tre ĝojus, kiam vi povus plenumi nian peton.
8. La aliĝoj estos akceptitaj nur ĝis la fino de junio.
9. Ni forigu la malsaton en la neevoluiĝintaj landoj!
10. La homa socio estas daŭre ŝanĝanta.

D. Esperantigu jenajn frazon:

1. 不知道为什么他总是大声说话。
2. 我发现他不爱讲话，总是很严肃。
3. 他对（体育）运动一窍不通。
4. 他会的，她全都会。
5. 她早晨散步时也朗读课文。
6. 怎样才能学好世界语呢？
7. 他讲的话我几乎全听得懂。
8. 我已告诉他们写什么来纪念“五一”。
9. 我知道该写什么，问题是不知从哪儿开始写。
10. 他虽然老了可是很活跃。

E. La fabelo de Andersen estas famekonata. Do, ĉinigu la tekston kaj poste komparu ĝin kun tiu en la ĉina eldono.

## LECIONO 19

### Novaj Vortoj

diamanto	金刚石, 钻石	gloro	光荣, 荣誉
gvidi (tr)	领导	penco	便士
ĉokolado	巧克力	fantomo	鬼魂
sorto	命运	guto	水滴
konstanta	恒常的; 经常的	bori (tr)	钻孔
granita	花岗石的	semi (ntr)	播种
velki (ntr)	枯萎	brava	勇敢的
hardi (tr)	锻炼		

## POEMOJ

### BRILU, ETA STEL'

Brilu, brilu, eta stel',<sup>1</sup>  
Diamanto sur ĉiel'!<sup>2</sup>  
Diru, kio estas vi,  
Tiel alta super ni?<sup>3</sup>  
Brilu, brilu, eta stel'!  
Diamanto sur ĉiel'!...

Kiam pasis taga glor',<sup>4</sup>  
Kaj la suno iris for,  
Venas via lumigil'<sup>5</sup>  
Kara eta nokta bril'.<sup>6</sup>  
Kiam pasis taga glor'  
Kaj la suno iris for...

La maristo dankas vin,  
Ĉar vi nokte gvidas lin.  
Ĉu la voon vidus li  
Se ne tiel brilus vi?  
La maristo dankas vin,  
Ĉar vi nokte gvidas lin...

(usona popolkanto)

### ĈU VI MEMORAS

Ĉu vi memoras, kara kunulino,<sup>7</sup>  
Kiel en infaneco kuris ni<sup>8</sup>



Al la butiko ĉe la strata fino  
Ĉiun sabat-matenon, vi kaj mi?  
Naz' al fenestro,<sup>9</sup> mane firmitenante<sup>10</sup>  
Karan moneron; post la ĝoja kur'  
Longe ni staris, zorge kalkulante  
“Kiom da tio ĉi por penco nur?”<sup>11</sup>

Mi finelektis kion vi proponis,<sup>12</sup>  
Ĝoje revenis ni kun ĉokolad'—  
Kio al mi pli da plezuro donis,  
La posta manĝo aŭ la pripensad' ?<sup>13</sup>  
(Usona popolkanto)

## LA VOJO

Tra densa mallumo briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.<sup>14</sup>  
Simile al stelo en nokta ĉielo,<sup>15</sup>  
Al ni la direkton ĝi diras.  
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
Nek batoj de l' sorto, nek mokoĵ de l' homoj,<sup>16</sup>  
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!<sup>17</sup>  
eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco—  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.  
Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,  
Pri l' tempoj estontaj pensante.<sup>18</sup>  
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,  
Ni semas kaj semas konstante.  
“Ho, ĉesu!” mokante la homoj admonas,  
“Ne, ĉesu, ne ĉesu!” en kor' al ni sonas:  
“Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
Se vi paciencie eltenos.”

Se longe sekeco aŭ ventoj subitaj  
Vekantajn foliojn deŝiras,  
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,

Ni forton pli freŝan akiras.  
Ne mortos jam nia bravega anaro,  
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,<sup>19</sup>  
Obstine ĝi paŝas, provinta, hardita,  
Al cel' unu fojon signita!<sup>20</sup>

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!  
eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco,—  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro  
Atingos la celon en gloro.

(de L.L. Zamenhof)

## 注 释

1. eta stel' 是主语 vi 的名称语。在祈使句里一般不使用第三人称的名词作主语，如一定要用时也只能用代词。这里的 eta stel' 不是主语。stel' 的名词 stelo 的省略形式。在诗歌里为了省去一个音节，常常用省去名词词尾 -o 或冠词元音 -a 的方法，但后面都要加省音符。
2. Diamanto sur ĉiel' 省去了主语和谓语，主语应是 vi，谓语是 brilas，还省去了 kiel，全句应是 vi brilas kiel diamanto sur ĉiel'。此外，上一行诗是逗号收尾，表示句子未完，那么，这一行应是上行的后半句，因此还应说省去了连词 kaj。诗分行后每行第一个字母一定要大写，不管它是否一句的开头或是否是专名词，这是诗的特殊规则。因此 Diamanto 第一个字母大写。以下每行第一个字母都是大写的，学员可参看。
3. 与第二行的道理一样，这一行也是半句并省去了主谓语 (kial vi estas)。
4. glor' 光荣，荣誉，引申为：业绩。Taga glor' 白天的荣耀，暗指白天太阳照耀，万物生气勃勃，欣欣向荣之意。
5. lumi 发光，lumigi 使发光，照亮，lumigilo 照亮的工具，灯烛，火把。
6. lumi 发出光线，照亮景物；brili 是发出明亮耀眼的光，lumo 是光明，brilo 是光亮，闪光。Nokta brilo 是夜里星星的闪光。
7. kun-ul-ino 女同伴。
8. Kiel 引导的从句是 memoras 的宾语从句。Infaneco 童年。
9. 省去了介词 kun: kun naz' al fenestro 鼻子按在窗玻璃上，是谓语 staris 的状态。
10. firm-ten-ante 紧紧地攥着，mane firmtenante 用手紧紧地攥着。
11. tio 没有复数形式，单复数事物都可用 tio 代替。
12. finelektis = fine elektis，合成一个词主要是为了省略一个音节：最后（终于）选定了。
13. 这行省去了介词 el，与上句连起来应是：Kio el la posta manĝo aŭ la pripensad'

donis al mi pli da plezuro?

14. al kiu 导入的是修饰语从句，修饰上行的名词 celo。
15. simile al 这种副词加介词的词组（当然这里包括其后的名词 stelo）叫做短语介词（或词组介词），在句子里作补语。这里它是主语代词的补语，它像夜空的星辰一样，向我们述说着方向。
16. nek...nek...是并列连词，它们后边跟的都是主语，省去了谓语宾语（timigas nin）。
17. iru la vojon 是目的格代替介词格的省略用法，原来是：ni iru sur la vojo celita.
18. pensante 状语，修饰谓语 semas。pri l' tempoj estontaj 是 penante 的间接宾语。
19. staro = star-o, stari 是站立，直立，转化为名词后表示竖立着的具体物：障碍；或抽象的概念：阻碍。这里作后面一种解释用。
20. fojon 是目的格代替介词格，加 unu 是强调数量：一次。signita 是名词 cel' 的修饰语。

## **ĈIUTAGAJ PAROLTURNĜOJ KAJ ESPRIMOJ**

### **AĈETADO**

1. Kion vi deziras?
2. Mi volas aĉeti ŝuojn (ĉapelon, vestaĵon).
3. Kian mezuron vi volas?
4. Mi volas n-ron 41.
5. Kian koloron vi preferas?
6. Flavan.
7. Mi ne scias. Montru al mi kelkajn je mia elekto.
8. Ĉu vi havas pli grandan (malpli grandan)?
9. Jes, eble tiu ĉi taŭgas al vi.
10. Sinjorino, tiu ĉi ŝtofo estas laŭmoda kaj bela.
11. Bela, jes, sed tro multekosta.
12. Tiu ĉi vestaĵo estas tro vasta por mi.
13. La jako bone sidas al mi. Mi ĝin prenu.
14. Kiom ĝi kostas?
15. Ĉu vi havas laŭmodajn pantalonojn?
16. Jes estas ankoraŭ kelkaj. La aliaj jam elĉerpiĝis.
17. Mi aĉetas librojn en Esperanto.
18. Ni ne havas. Vi devas turniĝi al libroservo de Esperanta asocio.
19. Mi volas aboni la gazetojn EPĈ kaj "La Mondo".
20. Ĉu vi havas vortarojn Esperantan-Ĉinan kaj Ĉinan-Esperantan?
21. Mi abonis vian revuon, sed ricevis neniun numeron.
22. Via abono estas enorde registrita kaj la ekspeddado estas ankaŭ regula.
23. Ni ja laŭnumere ekspedis la revuon al vi.
24. Via abono jam eksvalidiĝis fine de la pasinta jaro.
25. Mi petas paketon da teo (botelon da saŭco.)
26. Donu al mi duonkilogramon da sukero (kilogramon da porkaĵo).

27. Ĉu vi havas mielon?
28. Bonvolu doni al mi du brasikojn.
29. Mi aĉetas dek dekagramojn da fumajita porkaĵo.
30. Mi petas kilogramon da bovoviando.
31. Kaj ankaŭ duonkilogramon da salamo.
32. Ĉu en folioj aŭ en pecoj?
33. La salamon bonvolu tranĉi por mi je maldikaj folio. La bovoviando estu en unu peco.
34. Kiom kostas kvin dekagramoj da fumaĵitaj haringoj?
35. Kiom kostas kvaronkilogramo da butero?
36. Ĉu la ovoĵ estas freŝaj? Kiom kostas dek pecoj?
37. Jes, certe! Unu dolaro por dek pecoj.
38. Mi petas panbulon (dek bulkojn).

## 日常用语和句型

### 购 物

1. 您要点什么?
2. 我要买鞋(帽子, 衣服)。
3. 您要什么号码的?
4. 我要 41 号的。
5. 您喜欢什么颜色?
6. 黄色的。
7. 我不知道。请拿几种我挑挑。
8. 你有大一号(小一号)的吗?
9. 有, 也许这(双)对您合适。
10. 太太, 这块布料既时新又漂亮。
11. 漂亮倒是漂亮, 可是太贵了。
12. 这件衣服我穿太大了。
13. 这件上衣合我的身。我买下了。
14. 它多少价钱?
15. 你有时新的裤子吗?
16. 这还剩下几条。其它的都卖完了。
17. 我买世界语书。
18. 我们没有。你必须到世界语协会的书刊服务部去买。
19. 我要订阅“中国报道”和“世界”杂志。
20. 你有世汉和汉世辞典吗?
21. 我订了你们的杂志, 但一期也没有收到。
22. 你的订阅登记无误, 发货也是正常的。
23. 我们是按期给你发刊的。
24. 你的订阅去年底已止期了。
25. 我要一纸袋茶叶(一瓶辣酱油)。
26. 请给我半公斤糖(一公斤猪肉)。
27. 你有蜂蜜吗?

28. 请给我两棵白菜。
29. 我买二两腊肉。
30. 我要一公斤牛肉。
31. 还要一斤腊肠。
32. 要切片的还是要整个的？
33. 腊肠请切成薄片，牛肉要整块。
34. 一两熏鱼多少钱？
35. 半斤黄油多少钱？
36. 鸡蛋新鲜吗？买十个多少钱？
37. 当然新鲜！十个一美元。
38. 我要一条面包（十个园面包）。

## 语法

### 诗的格律

诗是韵文作品，是为了朗读而作的，要求有整齐的节奏和韵脚，特别不可缺少节奏，没有节奏不能成诗。

诗的节奏指的是由轻重音节构成的规律的音步。一首诗分为若干行，每行诗的音步数要相等（或每行相等或跳行相等）。音步是由音节构成的，因此每行诗的音节数也要有规律地相等。

构成音步的轻重音不同就分为不同的节奏，一般世界语诗的节奏有“重轻格”（trokeo），“轻重格”（jambo），“轻重轻格”（amfibrako），“轻轻重格”（anapesto）和“重轻轻格”（daktilo）等五种。

所谓“重轻格”是指诗里的音节是按重音轻音，重音轻音……排列的音步；“轻重格”是按轻音重音，轻音重音……排列的音步；“轻重轻格”是按轻音重音轻音，轻音重音轻音……排列的音步，余类推。其道理与汉语诗的“平仄格”“仄平格”等类似。这种严格按轻重音音步、节奏排列的是古典诗风，此外还有自由体诗风，它打破了这种音步排列的要求，每行诗的音节数也比较自由。其差别与汉语诗里的古典诗（文言文诗）与新诗（口语文和自由体诗）的差异情形的道理也类似。

韵脚是指每行诗的最后音节要押韵。世界语诗的韵脚是指每行诗最后一个重音节中的元音及其后的辅音（包括其后的轻音节）要一致或相似，通俗地讲就是押韵。押韵有每行押的，也有跳行押的。

下面以本课课文三首诗为例具体讲解。

第一首诗 *Brilu, eta stel'* 是“重轻格”节奏。全诗分三段，每段六行（实际上是每段四行，因为最后两行是重复），每行七个音节，按一个重音一个轻音两音节为一音步，每行是三个半音步；下面用“—”表重音，用“0”表轻音标明其节奏：

```

Brilu, brilu, eta stel'
- 0   - 0   - 0   -
Diamanto sur ĉiel'!
- 0 - 0   -   0 -
Diru, kio estas vi,
- 0 - 0   - 0   -

```

Tiel alta super ni?  
 -0 -0 -0 -

这首诗的节奏是重轻格，但它后半行有变化，变为“重轻重”。它的韵脚是两行一换韵，如：

stel'           ĉiel'  
 vĭ            nĭ  
 glor'          for  
 lumigil'      bril'

第二首诗 Ĉu vi memoras 是自由体诗，它没有严格的整齐音步，而是由单行十一音节和双行十音节交叉组成，除每行的第五个音节一定是轻音，第十音节一定是重音外，其它轻重音有不同变化，基本格局是：

Ĉu vi memoras, kara kunulino  
 - 0 0- 0 || - 0 - 0-0  
 Kiel en infaneco kuris ni  
 -0 0 - 0 || -0 -0 -  
 Al la butikoj ĉe la stratoj fino  
 - 0 0-0 || - 0 -0 -0  
 Ĉiun sabatmatenon, vi kaj mi?  
 -0 0- 0 || -0 - 0 -

其韵脚是隔行押韵，如：

kunulino           fino  
 ni                mi  
 firmtenante      kalkulante  
 kur'             nur

第三首诗 La vojo 是轻重轻格，即按轻音轻音重音三个音节组成一个音步，一三五六七行各四个音步，二四八行各三个音步，其节奏用符号表示如下：

第一行：0-0 0-0 0-0 0-0  
 第二行：0-0 0-0 0-0  
 第三行：0-0 0-0 0-0 0-0  
 第四行：0-0 0-0 0-0  
 第五行：0-0 0-0 0-0 0-0  
 第六行：0-0 0-0 0-0 0-0  
 第七行：0-0 0-0 0-0 0-0  
 第八行：0-0 0-0 0-0

世界语诗的韵脚分为阴韵和阳韵两种，阴韵指每行最后一个重音节（押韵的音节）后还有一个轻音节，阳韵则指最后的重音节是主音节（即它后面没有其它音节了）。据此，一般多音节词都是阴韵，只有单音节词和省去词尾的名词才能构成阳韵。如 Brilu, eta stel' 通篇都是阳韵，La vojo 通篇都是阴韵，而 Ĉu vi memoras 则是阴韵和阳韵交叉。通俗地讲：阴韵是指每行最后的音节是轻音，阳韵指最后的音节是重音。

重轻格诗大都是双音节词开头或两个单音节词开头，开头第一个音节（一、三、五音节）一定是重音。轻重格诗则多是单音节词开头，后跟双音节词。轻重轻格的诗一般都是三音节词或单音节加双音节词开头，组成轻重轻三音节的音步。

重轻轻格诗要求双音节词开头，后跟三音节词或单音节加双音节的词（有时也可以用单音节词重读开头，但其后必须跟四音节词或单音节加三音节的词），如：

Brilas okuloj, plenplenaj de ama larm'  
 - 0 0 - 0 0 - 0 0 - 0 0  
 Pro dolĉatendo, ekstazo kaj rav',  
 - 00 - 0 0 - 0 0 -  
 Tamen en koro sentigas de dram' alarm'...  
 - 0 0 - 0 0 - 0 0 - 0 -

以上都是世界语诗中常见的节奏格律，它们的共同点是遵守单词自然重音的规律，即单词的重音在诗中一定落在重音节奏上（单音节词可重读也可轻读，在诗中可用来调节格律）。但是在轻轻重格的诗里这种遵守单词自然重音的规律被打破了，因为轻轻重格律要求轻轻重为一音步，其排列是：

00- 00- 00- 00- 00-'  
 单音节词 三音节词 三音节词 三音节词 三音节词（省音）

很难做到一行诗里都是三音节词，用单音节词加双音节词来调节也很难做到，同时在世界语里双音节词数量多，不用不行，这样就产生了由于节奏的需要把双音节词中的重音轻读的变化，打破了单词的自然重音，如：

Vento flavajn foliojn deŝiras,  
 00 - 0 0-0 0-0  
 Ilin ĵetas kolere al ter'.  
 00 - 0 0-0 0 -  
 Falas pluv' ... mia koro sopiras,  
 00 - 00 - 0 0-0  
 Ree venas al ĝi malesper'.  
 00 - 0 0 - 00 -

这行诗每行开头都是双音节词，但由于格律的要求，它们都丧失了重音，变成轻读。轻轻重格的排列是比较困难的，因之这种体的诗也很少见，学员可作为常识了解就行了，开始时不要学习这种体的诗。

前面已讲过诗有节奏和韵脚的要求，这种要求使得诗的句序有时不得不作特殊安排，不能要求诗的句序与散文的句序一样。同时，诗又是分行写的。一句话在诗里不可能都写在一行里，因为句子有长有短，而每行诗的音节数要一致，这就产生了诗里的一句话一行写不完要放到下一行，有时甚至延长到二三行。

以上这些诗的特点决定了诗人写诗时不得不把词和词组适当安排以适合诗的格律要求。在诗里，特别在短的诗里由于每行音节有限，不得不省去一些句子成分，只保留最重要的词和词组，因此，诗里简化的句型和独立的短语常常用，这种独立的短语有时可以分析其省去了的句子成分（如省去主语、谓语、介词等等），有时很难分析。本课是第一次向学员解释世界语的诗，所选的诗歌基本上是那作句子分析的，难分析的那种没选这里只不过提一提让学员有个了解。此外，诗与散文的区别除了韵文和非韵文外，还有描写和表达的手法不同。散文是通过连续的讲述来描写，文章讲究“起承转合”，上下文有连续性，而诗则不同，它不能“浪费”笔墨，常常采取跳跃式的“跟镜头”的方式，通过一个个的画面来感染读者，唤起联想。这种手法在中外的诗中都不乏例子，例如汉语里的“天净沙”小令：

枯藤老树昏鸦，  
 小桥流水人家.....

整个诗都是些独立的词组构成，很难分析谁是主语，谁是谓语等等，人们读时感受的是一个一个如在眼前的画面，从而受到感染。在世界语诗里这种手法也是可用的，如本课第一首诗：

Brilu, brilu, eta stel',  
Diamanto sur ĉiel'!  
Diru, kio estas vi,  
Tiel alta super ni?

第一行两个命令式动词 *brilu*，显然的祈使句的谓语，主语省去了。这两个动词可说是省去了连词 *kaj* (*brilu kaj brilu*)，但也可以说它们是独立的。*eta stel'*是主语 *vi* 的名称语。第二行 *diamanto sur ĉiel'*是名词加补语：“天上的钻石”，可以解释为省去了主谓语 *vi brilas* 和介词 *kiel* (或是 *vi ŝajnas*，或是 *vi estus kvazaŭ*)，但也可以说是只省去了介词 *kiel* 或干脆就是个独立的词组。如按上述分析用一般的句子来写这四行就变成下面这样：

*Brilu, brilu, vi eta stelo, kaj vi brilas kiel (ŝajnas) diamanto sur la ĉielo! (kaj vi estus kvazaŭ diamanto sur la ĉielo!) Diru, kio estas vi kaj kial vi estas (ŝajnas) tiel alta super ni?*

这是散文，不是诗，与原诗比较可以看出诗是简洁的，含蓄的，有画面的，给人联想余地的，而散文则不是这样。散文是叙述的，完整的，没有许多省略的句子成分，因此也不给人遐想的余地。在诗里一些主谓语被省去了，剩下些词组，它们是精选过的语言，像电影似的一个个镜头画面，给读者以连续的印象，产生遐想，诗人的感情透过传达给读者引起共鸣。

诗是韵文作品，可以朗诵，容易上口，利于记忆。学习语言，背诵诗是大有益处的。有兴趣的同志可以选一些世界语名诗背诵，从中学习。

## EKZERCOJ

- A. Multfoje laŭtlege la poemojn kaj ilin parkere memoru.
- B. Provu verki poemon kun temo laŭ via plaĉo.
- C. Respondu jenajn demandojn:
1. Pri kio temas la unua poemo?
  2. Kio ŝajnas al vi stelo sur la ĉielo?
  3. Kiu dankas stelon kaj kial?
  4. Kiun memoras la aŭtoro en la dua poemo?
  5. Kiam okazis ke la aŭtoro kuris kun sia kunulino al la butikoj?
  6. Kion proponis la kunulino kaj kion elektis la aŭtoro?
  7. Kia estas la celo de esperantistoj kaj kia estas ilia vojo?
  8. Kiamaniere esperantistoj devas iri sian vojon laŭ konsilo de Zamenhof?
